

eLIBRO

Paul de Lengyel

Libro de l'humorájo

I N K O

Paul de Lengyel

LIBRO DE L'HUMORAJO

Lingve reviziita en 2002

eLIBRO

Aranĝis: Franko Luin

ISBN 91-7303-148-8

inko@omnibus.se

<http://www.omnibus.se/inko>

MAJO 2002

*L*a unua eldono de ĉi tiu libro aperis en 1899. Ĝi ne estas majstroverko, sed ĝi furoris, en la tiama malgranda esperanto-mondo, tiel ke en 1908 aperis nova eldono de ĝi. Tiu eldono estis uzita por ĉi tiu elektronika libro. Sed ne temas pri senŝanĝa represo. La lingvo estas iom reviziita por respeguli la nunan lingvouzon, sed sen ŝanĝi la stilon de la verkinto.

La historietoj estas, kiaj ili tiam estis. Ili estas spegulo de sia tempo kaj en kelkaj kazoj spegulo de la antaŭjuĝoj ekzistantaj antaŭ cent jaroj. Mi ŝatus skribi, ke ni ne plu havas tiujn antaŭjuĝojn, sed pli kaj pli mi miras. Eble ni liberiĝis de kelkaj el ili, sed anstataŭe ekhavis novajn.

Tamen, ankaŭ post cent jaroj, tiu ĉi libro igos vin jen kaj jen ridi, aŭ almenaŭ rideti. Kaj tio estis kaj estas ĝia celo.

Franko Luin

TRI DEMANDOJ

Dum la regado de la reĝo hungara Matiaso, kiu havis la alnomon "Justa" kaj estas konata pro sia populareco, okazis tiu ĉi anekdoto.

Ofico estis vakanta en la ĉefurbo de Hungarujo, pri kiu konkuris ankaŭ la pastro de vilaĝo Czinkota.

La reĝo dirigis al li, ke se li estos kapabla ĝuste respondi je liaj tri demandoj, li ricevos la deziratan oficon.

La pastro ne estis klera, li timis pro la demandoj. Li komunikis la aferon al sia kantisto, petante lian konsilon.

— Via pastra moŝto, — diris la kantisto, — mi kredas, ke mi povus solvi la reĝajn demandojn. Mi proponas al vi, ke mi vestu min per via pastra vesto; la reĝo konas nek min nek vin, mi do iros en la ĉefurbon Buda kaj aperos antaŭ lia reĝa moŝto ŝajnigante min la pastro de Czinkota.

La pastro konsentis; la kantisto en la vesto de l'pastro aperis antaŭ la reĝo.

— Nu, mia filo, — demandis unue la reĝo, — kie leviĝas la suno?

— Por via reĝa moŝto en Buda, por mi en Czinkota.

— Ĝuste. Nun diru, kian valoron havas la reĝo?

Post kelkaj sekundoj li respondis certe:

— Dudek naŭ moneroj da arĝento; ĉar nia Sinjoro Jesuo-Kristo estis vendita por tridek, kaj nur post Li venas la tera estro de homoj.

— Brave, mia filo. Sed nun venas la demando plej malfacila: kion mi nun pensas?

— Tiu ĉi demando estas la plej facila. Vi pensas, ke vi nun interparolas kun la pastro de Czinkota, kvankam vi parolas kun la tiea kantisto.

Poste li sincere rakontis la tutan aferon. La pastro ricevis la oficon, kaj la kantisto donacon de la reĝo.

EKZERCO FARAS ĈION

Lia imperiestra kaj reĝa moŝto Josefo vizitis iam monaĥejon.

Dum la tagmanĝo li rimarkis belegan, grandan kruĉon arĝentan, kies enhavo estis ĉirkaŭ *du litroj*.

— Kion signifas tiu kruĉo? — demandis li scivole.

Monaĥo klarigis:

— Antaŭe, oni tiel diras, kiam altranga gasto ĉeestis en la monaĥejo, dum la tagmanĝo la kelisto per unu fojo eltrinkis la tutan vinon enhavatan en plena kruĉo, je la sano de la honorinda gasto.

— Kiu estas nun la kelisto? — demandis la imperiestro.

— Patro Ambrozio.

La imperiestro venigis lin.

— Nu, provu, — li ordonis al Ambrozio.

— Tiu kutimo, — respondis Ambrozio, jam malaperis; ĝi ekzistis en la bonaj antikvaj tempoj. Tamen mi provos obei al la plej obeinda ordono, — sed mi petas vian imperiestran moŝton, volu permesi al mi preni la templimon de dek minutoj.

— Bone, — diris la imperiestro. Patro Ambrozio foriris. Post dek minutoj li denove aperis.

— Nun mi estas preta, — diris Ambrozio.

Kaj li eltrinkis la vinon de la plenigita kruĉo.

— Brave! tre brave! — parolis la respektinda gasto. — Sed diru al mi, kial vi bezonis la dekminutan tempolimon?

— Mi timis, ke mia entrepreno ne sukcesos. Mi do iris en la kelon; tie estas unu samgranda vinkruĉo. Antaŭe *mi devis provi*, ĉu mi estas kapabla trinki per unu fojotiom da vino, ĉar "ekzerco faras ĉion".

ENTERIGA MANDATO

Miĥaelo Krasznay estis tre alteŝatata aktoro en Kolozsvár (Hungarujo). Ĉiu amis lin: direktoro, kolegoj, publiko, eĉ la kritikistoj. Oni do povas imagi, kiajn donacojn li ricevis, kiam li havis sian "premian" vesperon. Ĉiu donis al li ion konvenan, jen amuzan, jen utilan. Sed la plej strangan donacon faris al li sinjoro Czech, kiu estas posedanto de enteriga entrepreno. Li donis al li belegan florkronon, en kiu estis kaŝita koverto enhavanta la sekvantan skribaĵon:

"Mandato, kies posedanto rajtas senpage ricevi de mia negoĉejo enterigan aranĝon 400 kronojn kostantan por sinjoro M. Krasznay."

La amikoj de Krasznay multe amuziĝis je la stranga donaco, poste ili baldaŭ forgesis ĝin ...

Sed okazis, ke tiu ĉi donaco bedaŭrinde aktualiĝis. Krasznay mortis, lasante sian edzinon en granda mizero. La vidvino, tuj post la morto de l'edzo, vizitis sinjoron Czech.

— Sinjoro, — ŝi diris, — aŭdu. Ĉu ni povis pensi, ke mi jen bezonas vian donacon? Oni devas enterigi mian kompatindan edzon. Mi ne havas monon ... Vi ja memo-

ras pri la mandato ... Ĝi perdiĝis, aŭ forerariĝis inter la ceteraj multaj skribaĵoj, — mi ne retrovas ĝin ... Havu la bonecon, kara sinjoro Czech ...

— Jes, jes, sinjorino, — respondis Czech, gratante sian vereton, — mi ĝin donacis al via edzo; sed li (Dio havigu al li eternan pacon), la sekvintan tagon ĝin vendis al mi por ducent kronoj kaj tiun sumon li kun siaj amikoj "fortrinkis" je la sama vespero.

INTERŜANĜO DE IDEOJ

La fama germana poeto Heine havis unu konatulon, nomatan Weiss, kiu lin ofte vizitis, ĝenis en la laboro kaj tedis per siaj babiladoj.

Sinjoro Weiss malkaŝe fanfaronis pri sia konatulo, disanoncante, ke li ofte vizitas Heine'n, por "interŝanĝi ideojn".

Foje, unu el la tiamaj verkistoj venis al Heine, kaj inter aliaj, li ekparolis pri sinjoro Weiss kaj pri liaj diradoj.

— Kaj kion li diras pri la celo de siaj vizitoj? — demandis Heine.

— Li diras, ke li iras al vi por interŝanĝi ideojn ...

— Ha! — ekkriis Heine, — nun mi komprenas, kial mi sentas min tiel malsprita ĉiam post lia foriro!

HUMORAJO

EN KAPTILO

Mi estas konvinkita, ke neniu konsideras kiel mirindaĵon, se privata oficisto, 27-jara, havas ŝuldojn. Tial do Emeriko Kahel ne estas mirinda, — ĉar li estas privata oficisto, 27-jara kaj havas ŝuldojn.

Imagu straton malvastan kaj en ĝia mezo belan junulon, — sur unu el ĝiaj randoj altan, maldikan sinjoron kun okulvitroj kaj pinta barbo, — sur la alia viron iom pli fortan kaj dikan, kun grandaj lipharoj. La bela junulo terure rigardas tien ĉi kaj tien, poste li subite enkuras domon tra pordego. La du suspektindaj viroj rapidas post li, — ili renkontas ĉe la pordego unu la alian.

— Li malaperis, — tondras unu el ili.

— Li forkuris, — grincas la alia.

— Ni restu embuske, — daŭrigas la du viroj unuvoĉe.

Nun mi vin informos, kara leganto, pri la personoj de la jena aventuro mistera. La bela junulo estas Emeriko Kahel, — la viro longa, maldika, kun barbo pinta estas Mateo Faden tajloro, — la pli forta kaj dika persono estas Petro Piedul ŝuisto. Emeriko Kahel estas ŝuldanto al la du aliaj sinjoroj, kaj li rifuĝis de ili tra la pordego okaze estanta antaŭ li.

*

Nu, mi devas rakonti, kien li malaperis.

...Ekzistis jam ŝuldanto en tia situacio, ke li iris al dentisto kaj eltirigis sian plej sanan denton, por eviti la renkonton de sia kreditoro; — kial do Emeriko Kahel ne estus irinta en loĝejon, sur kiu estis tiu ĉi surskribo: "Adolfo Grünstein, makleristo"? Estas vere, ke li ne sciis, kiaspeca makleristo estas sinjoro Grünstein, sed li konfidis, ke li trovos tie, kion li bezonas.

Malafabla servistino demandis de li:

— Kion vi deziras?

— Ĉu la sinjoro estas hejme?

— Lia sinjora moŝto estas en la kontoro; volu eniri.

Emeriko eniris.

La unua afero, kiun li ekvidis, ne estis tiu viro malgranda, senhara, afable ridetanta, kiu sidis post granda skribtablo, — sed la fenestro ĉe la flanko de l'strato, tra kies kurtenoj agitiĝis du homombraj konturoj.

— Ho Dio! ili embuskas por mi! — murmuris li.

— Per kio mi povas servi al vi? — demandis sinjoro Grünstein, kun la plej larĝa rideto.

— Per kio vi povas servi al mi? — rediris Emeriko aŭtomate.

— Nu, nature ...

— Jes, jes, — respondis Emeriko kaj per ĉiuj fortoj li

pensis: pri kio do lin peti. Fine li diris kun subita decido kuraĝega:

— Oni donis al mi vian adreson.

— Mi estas tre feliĉa pro tio. Via sinjora moŝto estos kontenta de miaj servoj.

— Kian garantion vi povas doni?

— Ho! estu trankvila pri mia silento, diris la makleristo.

— Ha! ha! — pensis Emeriko, — li estas procentegulo. Des pli bone. Eble mi sukcesos fari ian "pumpon". — Kaj laŭte: Mi esperas, ke la procento ne estas troa.

— Troa? Kion vi pensas? Unu procento kiel provizaĵo, kaj nenio alia.

— Nu, tio ĉi ne estas troa.

— Vi estos kontenta. — Mi petas pri via nomo, por ke mi ĝin enskribu.

— Emeriko Kahel.

— Via profesio?

— Privata oficisto.

— Via aĝo?

— Dudek sep jaroj.

— Viaj gepatroj?

— Eble tio ĉi ne estas necesa por nia afero.

— Ho jes! La familio estas tre grava. Mi servas al tre estimindaj familioj. Eĉ al familioj nobelaj, mi tion ĉi diras al vi, sinjoro. Ĉu ankaŭ vi estas nobela?

— Jes, kun la alnomo "de Bodrog".

— "Nova-Bodrog"! ... Vivu! vivu! Dek kvin mil, — vi vidos, dekkvin mil florenoj!

— Ho, tiom ne estas necesa, — diris Emeriko modeste.

— Kion vi diras? Vi estas la unua, kiu malŝatas la monon, kiun mi proponas.

— Ho, mi havas nur cent florenojn kiel monatan salajron.

— Sufiĉe, sufiĉe, sinjoro de Nova-Bodrog. Vi havos dekkvin mil! Kia vi deziras, ke ŝi estu? blonda? bruna?

— Kiel mi devas kompreni tion ĉi?

— Nu, la fianĉino.

— La ... la ... fian ... an ... ĉino?

Lian korpon trakuris malvarmo. Nenia dubo: li falis inter ungegojn de makleristo por edzeco.

— Estus pli bone, se mi forirus, — pensis li.

Sed tio estas neebla. Antaŭ la fenestro gardas la du kreditoroj.

— Ni daŭrigu do la komedion, — li diris al si. Poste li kuraĝis paroli:

— Mi ... mi amas la blondulinojn.

— Ĝuste, — respondis sinjoro Grünstein kaj daŭrigis kantante:

Kial do ni serĉus

Brunulinon?

Kial, se ni amas

Blondulinon ...

Mi havas blondulinojn en ĉiuj specoj. Ĉu vi deziras, ke ŝi estu alta?

— Me ... meze alta.

— Inter cent kvindek ses kaj cent sesdek ses centimetroj. Vi havos tian. — Ĉu dikan? maldikan? grasetan?

— Nu, mi preferus ŝin graseta.

— Vi havos ŝin ... Ha! Ĵus venas penso en mian cerbon! Mi havas unu tian knabinon por via sinjora moŝto. — He, Ignaco! Ignaco!

Senorda buklohara junuleto aperis.

— Tuj kuru al ŝia fraŭlina moŝto Adelgundo; mi tre petas ŝin veni ... Diru al ŝi, daŭrigis li mallaŭte, — ke oni atendas ŝin.

Poste li turnis sin al Kahel:

— Ni povos tuj aranĝi la aferon.

*

Emeriko Kahel sentis sin, kvazaŭ lin prenis mara naŭzo.

Kaj la du ombroj ne formovis sin.

— Ho Dio, kio okazos!

Sinjoro Grünstein parolis, paroladis al li kaj rakontis tre enuigajn spritaĵojn kun afabla maniero.

Post kvaronhoro venis fraŭlino.

— Tio estas ŝi, — diris diskrete la makleristo.

Emeriko preskaŭ falis svenante de la seĝo.

La "blondulino" estis ruĝa, kiel flamo, kaj ŝian grasecon eĉ la plej preciza aŭtomata pesilo ne montrus pli malpeza, ol okdek ok kilogramojn.

— Ha, kara fraŭlino, kia feliĉo por mi! — ekkriis Grünstein. — Kiel mi povas danki tiun ĉi agrablan okazon?

— Mi venis por viziti vian karan edzinon.

— Ho, ŝi tre ĝojos pro tio. Mi tuj avertos ŝin, se ŝi estas hejme. Volu sidiĝi, mi baldaŭ revenos ... Sinjoro Emeriko Kahel, mia bona konato, el nobela familio, kun la alnomo "de Nova-Bodrog" ... — Fraŭlino Adelgundo. Mi petas, distru vin kune.

Kaj li malaperis.

... Fraŭlino Adelgundo mallevis siajn okulojn kaj diris:

— Ha, sinjoro, ni estas solaj.

— Jes, ni estas solaj.

— Ĉu vi ne timas?

— De kio?

— Mi ĉiam timas, kiam mi estas sola kun juna fraŭlo.

— Mi ne.

— Ĉu vi estas tia, kiel estas la aliaj? — ĝemis la fraŭlino, tirante sian seĝon pli proksimen al Emeriko.

— Ne, ne, mi ne estas tia.

— Ĉar la homoj estas nuntempe tiel realistaj, sinjoro.

— Tre realistaj, fraŭlino.

— Sed vi ne, sinjoro?

— Mi ne, fraŭlino.

— Je kiu mi edziniĝos, tiu min estimu, honoru, amu ... ne mian monon ... ĉu tio ne estas vera, kara ... kara

— "Kahel".

— Mi petas, diru al mi vian baptonomon.

— Emeriko.

— Kara Emeriko. Ha, ĉu vi permesas al mi? Mia nomo estas Adelgundo; sed tiuj, kiuj min amas, min nomas Adenjo.

Emeriko malespere rigardis jen la ruĝan fraŭlinon, jen la fenestron. La knabino estis jam tute proksime al li, — ŝi eĉ jam karesis lian manon.

— Kio ankoraŭ okazos! — pensis li.

— Nu, ĉu vi nenion parolas? — demandis la knabino.

— Jes, fraŭlino.

— Ho, diru: "Adenjo".

Emeriko kontraŭvole elbalbutis:

— Ade ... denjo.

Post momento la knabino pendis je lia kolo, kiel la pomo je sia arbo, aŭ pli ĝuste, kiel la kokosnukso je la palmujo.

— Vi do amas min! — ekkriis ŝi.

Ĝuste tiam aperis subite sinjoro Grünstein.

— Mi gratulas vin, mi gratulas vin!

— Ho, malbonulo, — diris Adelgundo neruĝigante.
Ĉar ŝi estis ĉiam ruĝa.

Emeriko rigardis la fenestron. La du ombroj malaperis. Sed eĉ se ili ne estus malaperintaj, li estus aginta tiel, kiel li tiam agis. Li komencis balbuti:

— Jes ... jes ... tuj ... bonan tagon.

Poste li kuregis, kvazaŭ lin persekutus ia leono. — —

Kio okazis pri fraŭlino Adelgundo, tion mi ne scias; sed mi povas certigi, ke Emeriko de tiu tempo pagas siajn ŝuldojn al Mateo Faden tajloro kaj al Petro Piedul ŝuisto kun akurateco miriga.

FOR LA VIANDON!*De Sipulusz*

Dion mi benas pro tio, ke mi povis veni loĝi en ĉi tiun malgrandan, antaŭurban domon. Sole al la okazo mi dankas pri tio ĉi.

Foje mi tagmanĝis en malgranda sensignifa restoracio. Apud mi sidis maljuneta, bonvestita sinjoro, kiu, kiam mi sidiĝis, manĝis kukuman salaton kaj trempadis panopecetojn en ĝian vinagron, kvazaŭ ĝi estus viand-grasaĵa saŭco.

Mi regalis min per kariofilsupo, poste mi mendis unu porcion da ŝpinacaĵo, — poste ankoraŭ unu porcion da ŝpinacaĵo, kaj mi trinkis nur akvon ... kion fari? Mi ne havis sufiĉe da mono por tagmanĝi ian viandaĵon.

Tiam mi rimarkis, ke la "kukumsalatulo" akompanas kun akra atento mian modestan manĝon. Kiam mi finis ĝin, li alparolis min:

— Sinjoro, ĉu vi estas vegetmanĝisto?

— Jes.

(Kion diri? — mi hontis konfesi al li mian malriĉecon.)

— Kial vi estas tia?

(Eĉ se mi tia estus, mi ne povus argumenti.)

— Mi ne povas manĝi ion, kion oni ricevas nur per

mortigo de vivanta estaĵo, — mi diris subite, mallonge, sed konvenege.

— Brave, junulo! Kaj kial vi ne trinkas vinon?

— Mi ne prenas tian trinkaĵon, kiu povas eksciti la homajn malbonajn kapricojn kaj ecojn.

— Tre ĝuste. Vi estas bravulo. Kian profesion vi havas?

— Mi estas oficisto de la urba depagofico.

— Ĉu vi havas loĝejon?

— Jes.

— Ĉu vi ne deziras ĝin forlasi?

— Kial vi demandas tion?

— Ĉar en mia domo estas ankoraŭ unu loĝejo, kiu estas malkare luebla de bonmorala, sola junulo, — respondis la maljuneta sinjoro.

— Kion vi komprenas per *bonmorala*? Apartan enirejon el la ŝtuparo?

Li surprize rigardis min.

— Kredeble vi antaŭ nelonge fariĝis viandon-ne-manĝanto, alie vi ne parolus tiel ... Kion mi komprenus? mia loĝanto estu vegetmanĝisto.

— Ĉu vi estas tia?

— Mi estas ĉiama honora prezidanto de l'Societo de la Vegetmanĝistoj, kaj la plej energia apostolo de la vegetaĵanismo. Ĉu vi ne aŭdis ankoraŭ pri Tobias Müller?

— Vi ... vi estas do Tobias Müller? Sinjoro, permesu al

mi, ke mi levu mian rigardon kun la plej granda respekto sur viajn harojn blankiĝintajn en la kreskaĵmanĝado.

— Levu ĝin. Nu, ĉu vi volas fariĝi kunloĝanto.

— Sendube. Kiam mi povus iri?

— Tuj.

— Ni iru.

— Kaj via apartenaĵaro? ...

— Tio ne estas grava.

Post duonhoro mi estis en la nova loĝejo.

Bela, agrabla domo, kun malgrandaj, sed puraj loĝejoj, en kiuj ekskluzive vegetaĵanoj loĝis. Mia ĉambro estis aminda, guste meblita; sur la muroj pendis portretoj de nekonataj homoj, — apostoloj de la viandon-nemanĝo, kiujn la viandon-manĝantaj barbaroj kuiris eble en oleo aŭ trempis en varmegan pecon. La ĉambro kostis ses florenojn ĉiumonate, kaj sekrete mi deziris, ke estus bone, se ĉiuj budapestaj dommastroj fariĝus vegetaĵanoj.

Ĉiuj kunloĝantoj akceptis min kiel fraton, kaj ni reciproke konsentis en ĉio, kiel la unuaj kristanoj en la jarcentoj de l'persekuto.

En la mateno de la sekvinta tago bela knabino portis al mi kakaon.

— Kiu sendas la kakaon? — mi demandis de la knabino.

— La dommastro. Tio ĉi okazas ĉiutage, por ĉiu loĝanto.

— Ĉu oni devas pagi por ĝi?

— Ne.

Bonege! Kredeble la nova religio tre baldaŭ disvastiĝos kaj la kakaofabrikistoj estos la plej riĉaj homoj de l'mondo.

Ĝis nun mi pagis 30 florenojn ĉiumonate por loĝado, sekve la vegetaĵaniĝo pligrandigis je 24 florenoj mian salajron. Kion faros el tiu ĉi mono la junulo, kiu havas pli multajn ŝuldojn, ol li povus ilin elpagi kaj komenci la partumajn pagojn? Li plibonigos la sinnutron. Mi abonis tagmanĝon je 18 florenoj pomonate en urboflanka restoracieto, kaj tie mi manĝis tiom da viando, kvazaŭ leono.

Tamen, kiam mi renkontis Tobiason Müller, mi ruĝiĝis; ĉar la restoj de l'konscienco ekzistas ankoraŭ neneigeble en mi. Akran rigardon li ĵetis al mi el siaj grizaj okuloj, sed nenion diris

Mi sentis la neceson firmigi mian pozicion. Mi aĉetis por unu floreno lardon fumaĵitan, kaj mi portanta ĝin iris al sinjoro Müller:

— Sinjoro, — mi diris. — Mia patro estas vilaĝano kaj la vegetaĵanismo senefike forflugas super li. Vane mi instigas lin, li ne sekvas min; li eĉ volas min eltiri, — jen li

sendis al mi tiun ĉi lardon, kiun mi transdonas al vi, kiel signon de mia fideleco kaj firmeco.

Larmoj aperis en la okuloj de Müller.

— Mi dankas, junulo. Ni kondamnos tiun ĉi lardon kvazaŭ rifuzindan malamikon. Solene ni bruligos ĝin.

— Ne faru tion, Sinjoro Müller, ne reveku la dormantan leonon; pripensu nur: rostita lardo ... ha, mia Dio!

Kaj mi eliretigis trifoje mian langon. Sinjoro Müller laŭte kalkulis la nombron de l'eliroj, poste li severe diris:

— Aj, aj, junulo! Ŝajnas, ke en vi jam ekrevekiĝas la dormanta leono.

Mi ekkaptis lian manon:

— Sinjoro, — mi diris senteme, — ne komparu min kun la plej terura viandon-manĝanta monstro. Veku en mi la kamelon, la bovon, la kapron, la kanguruon, sed lasu la leonon.

— Bone, mi vidas, ke vi estas fervora samideano. Metu la lardon sur la tablon.

Post tiu ĉi sceno dum pli longa tempo mi ne renkontis lin.

Unu fojon mi decidis, ke mi esploros la lignejon apartenantan al mia loĝejo. Brulantan kandelon mi prenis kaj iris en la kelon.

Kiam mi senbrue trairis sur la mola fundo de l'malluma antaŭkelo: prezentu al vi, kion mi vidis tra la lig-

na kradaro de l'barilo? Sinjoro Müller sidis sur unu barelo kaj li bonhumore "lardumis"; li manĝis mian lardon.

— Bonan apetiton, sinjoro Müller! — mi diris kviete kaj sidiĝis apud lin.

En la sekvinta minuto mi tranĉis pecon da lardo el la tutaĵo kaj komencis ĝin manĝi kun la plej natura mieno.

Sinjoro Müller rigidite de surprizo rigardis min dum unu momento, poste li rekonsciiĝis kaj diris:

— Ki ... kion? Ĉu vi manĝas lardon?

— Kompreneble! Ĝi estas ja *vegetaĵlardo*; alie vi ne manĝus ĝin.

— Sendube, ĝi estas nerekte vegetaĵa manĝaĵo, — respondis sinjoro Müller, per tono iom malpli severa.

— Kiel?

— Ĉar ĝi estas farita el la viando de vegetmanĝanta besto.

— Nu? — mi demandis mirigite.

— De porko. Ĝi manĝas glanojn, branon, maizon, terpomojn kaj kukurbojn. Unuvorte: ĝi estas samideano.

— Vere; forkalkulante la glanojn kaj la branon, ĉar tion ni ne manĝas.

— Vi estas prava. Sciu, ke la progrespartianoj signife faciligis la dogmojn.

— Vi estas do progrespartiano?

— Jes; — respondis sinjoro Müller neŝanceliĝante, —

kaj tiujn bestojn, kiuj manĝas nur kreskaĵajn nutraĵojn, mi ne kunkalkulas kun viandomanĝaĵoj.

Nun li subite rifuziĝan ekmovon faris per sia mano:

— Eĥ, eksciuj ĉion; — mi fariĝis eks-sektano.

— Ha!

— Nia prezidanto subite mortis kaŭze de apopleksio. Tiu ĉi cirkonstanco pruvas, ke la vegetaĵanismo ne asekurigas kontraŭ apopleksio. Kaj, ĉar mi fariĝis vegetaĵano nur pro la timo de apopleksio, tial mi eks-samideaniĝas. Morgaŭ mi eĉ malfondos la domon. Vi pagos de la unua de l'venonta monato 25 florenojn por la loĝejo. Bonan tagon!

La sekvintan tagon li sciigis la loĝantojn per cirkule-ro pri la ŝanĝo.

Kaj la unuan de la sekvinta monato mi rekomencis tagmanĝi kariofilon kaj spinacaĵon; kaj mi tuj refariĝis vegetmanĝanto, kiam mi ĉesis esti vegetaĵano.

MALHELPITA BIGAMIO

Sinjoro Molnár, riĉa, sed avara sekretario, rimarkis, ke liaj vinoj konsumiĝas je pli granda mezuro, ol li konsumadas ilin.

— Mi havas doman ŝteliston, — murmuris li al si. — Sed li gardu sin, ĉar li rapide falos en mian kaptilon.

Lia suspekto falis sur sian servanton, sur la diboĉeman, trinkeman Miĥaelon. Sinjoro Molnár volis lin surprizi en la ŝtelo, tial li faris planon por atingi sian celon.

Duonhoron antaŭ la tagmanĝo li rapidis en la kelon kaj kaŝis sin. Li sciis bone, ke Miĥaelo baldaŭ venos preni vinon por la manĝo. Kaj la saĝa sekretario bonege konjektis.

Li aŭdis paŝojn. La servanto venis. Miĥaelo prenis unu botelon da vino, levis ĝin supren kaj entuziasme diris:

— Ĉeestanta Miĥaelo Soifanta deziras edziĝi je ĉeestanta fraŭlino Vino, naskita en Tokaj, — kaj ĉar neniu havas kontraŭdiron, la edziĝo estos tuj efektiva.

Kaj li eltrinkis la vinon, ĵetis la botelon flanken kaj prenis alian en la manon, kiun li portis sur la tablon.

Sinjoro Molnár kaŝis sian koleron. Li tagmanĝis bone, kaj post la manĝo li venigis al si la servanton.

— Ĉu vi volas esti en edziĝa festeno?

— Tre volonte, sinjoro.

— Venu do, — diris la sinjoro, malkroĉante de najlo skurĝon.

Poste la sinjoro daŭrigis:

— Ĉeestanta Miĥaelo Soifanta deziras edziĝi je ĉeestanta fraŭlino Skurĝo, naskita en Hamburg, — kaj ĉar neniu havas kontraŭdiron, la edziĝo estos tuj efektivigata.

Kaj li levis la skurĝon por lin bati. Miĥaelo saltis rapide flanken.

— Haltu, sinjoro, — diris li, — mi havas kontraŭdiron.

— Ha, fripono! — kriegis sinjoro Molnár, — ĉu ne vi eltrinkis mian vinon?

— Precize pro tio, — respondis la servanto, — *mi havas jam edzinon*, mi ne volas fari bigamion.

La sinjoro ridis je la spritaĵo kaj pardonis al li. Tamen de tiu tago ne Miĥaelo, sed la ĉambristino portas la vinon por la manĝo de sinjoro Molnár.

"POSTE RESTANTE"

(Rakonto de konvertito)

Nu, amiko, vi demandas, kio kaŭzis, ke mi tiel bone, tiel delikate kunvivas kun mia edzino. Mi rakontos al vi sincere la aferon, sidiĝu komforte, volu ekfumi kaj aŭskultu.

*

Antaŭ du jaroj, en la karnavala tempo, mi legis la sekvantan anonceton en ĉiutaga gazeto:

"Kiu bonkora viro volus reĝojigi velkantan koron de virino?

Brulanta amo."

Vi scias, ke mi ĉiam estis granda amiko de aventuroj. Nu, atendu, — pensis mi, —mi reĝojigos vin! la sekvintan tagon mi anoncis la jenan respondon:

"Al Brulanta amo.

"Forgesita 26-jara blondulo sentas la deziron resanigian doloratan koron. Volu skribi leteron sub la malsupra adreso poste restante.

Fajra amo."

Tute kompreneble mi havis leteron en la sekvinta tago. Mi tuj rekonis la delikatan skribon de virino; mi eĉ vidis, ke la skribintino apartenas al la klerularo.

Rapide fariĝis inter ni varma, konfidencia korespondado. Ĉiutage mi interŝanĝis leteron kun la stranga nekonatulino, kiun mi jam tre deziris koni.

En letero mi petis ŝin, ke ŝi difinu lokon kaj tempon, kie kaj kiam ni povus renkonti unu la alian. Ŝi plenumis mian deziron, skribante, ke ŝi ĉeestos en la proksima maskobalo kun kostumo de husara leŭtenanto.

Tuj mi sciigis ŝin pri mia decido, ke mi ĉeestos en la balo, vestita kvazaŭ ĉevalisto hungara.

Malrapide alvenis la atendita tago. Mi tre ĝojis de la — espereble dolĉa — aventuro, kies efektivigon ĝenis nur unu cirkonstanco.

Kion mi diros al mia edzino? kien mi intencas iri? — Tio estis pikanta punkto.

Hop, antaŭen!

— Kara edzineto, — diris mi timante, hodiaŭ estas la nomtago de unu mia amiko; pardonu al mi, mi ne pasigos hodiaŭ la vesperon apud via amata flanko.

(Estis por mi feliĉe, ke ŝi ne demandis min pri la nomo de mia amiko, ĉar mi ja ne estas sperta pri la kalendaro.)

Kun ruza rideto ŝi donis al mi la forpermeson ...

Post dek minutoj mi jam forestis, — post dudek jam kvazaŭ hungara ĉevalisto promenadis en la balsalono.

Mi malesperis jam la renkonton: la leŭtenanton de husaroj ne povis trovi miaj avidaj okuloj .

Sed mia malespero baldaŭ forflugis, — jen ŝi eniris la salonon.

Unue mi sekvis ŝin en ŝatinda malproksimeco, poste mi komencis la interparolon.

Senpacience mi atendis la paŭzan horon, kiu tre malrapide alvenis per testudaj paŝoj. Maltrankvile mi iris flanken kun mia koleginino por ŝin ekkoni. Sed, — je mia nekaŝebla surprizo, — ŝi petis min, ke mi konduku ŝin en mian loĝejon.

Vi povas kompreni, kara amiko, mian grandan embarason. Tamen mia cerbo estis jam preskaŭ tute konfuzita per nekonata sento; mi obeis.

Ni sidiĝis en fiakron.

La ĉambro de mia edzino estis peĉonigra, ŝi dormis. Timante mi kondukis la leŭtenantinon en mian apartan ĉambreton. — Farinte lumon, mi petegis ŝin forĵeti la maskon.

Nun la bela leŭtenantino eltiris sian glavon kaj metis sin en minacantan pozon.

— Nu, kara "Fajra amo"! Malnobla, kanajla fripono! — diris ŝi laŭte.

Ho ĉielo! tiu voĉo! tiu tono! ...

Subite ŝi forĵetis sian maskon.

Imagu, amiko, kiu estis mia koleginino! Imagu! *Mia ed-*

zino, — ĉu vi komprenas? mia edzino, jes, mia edzino! Ŝi staris antaŭ mi kun la eltirita glavo, kiel punanta kerubo.

— Nu, juna deloganto! kiel plaĉas al vi la leŭtenanto?

Pro la teruro mi ne povis paroli. Ŝi turnis sin kaj kun fieraj paŝoj forlasis la ĉambreton, kiel efektiva tragika aktorino. — — —

La radioj de l'revenanta suno trovis en mia ĉambreto malĝojan ĉevaliston, sidanta apud la tablo, apoganta la kapon sur siajn brakojn.

Ĉu vi ne estas scivola koni, kiel mia karega edzino estis diveninta mian aventuron? Tre simple ... Ŝi estis trovinta kaj leginta mian unuan leteron, kaj ŝi mem estis portinta ĝin el la poŝto. Mi korespondadis nesciante kun mia edzino.

*

Nun vi scias, kara amiko, kial mi kunvivas tiel bone, tiel delikate kun mia edzino. Ofte eĉ nun ni rememorigas unu la alian pri la rakontita aventuro; kaj tiam nia gaja ridego preskaŭ eksplodigas la domon.

LA TERNO

Patrino, kiam vi ternas, kien malaperas la terno, kiun vi ĵus eligis?

— Ĝi iras en la aeron, mia filo.

— Kaj se pro ia kaŭzo ĉesiĝas la terno?

— Mi ne scias, mia filo. Lasu min trankvila.

— Diru, ĉu ĝi reiras tien, de kie ĝi komencis elveni?

— Estas eble. Sed nun eliru kaj ludu ion..

— Je tia okazo vi devas ĝin alifoje elterni; ĉu ne vere?

— Verŝajne ...

— Ĉu vi ne ternos plu, kiam vi estos elterninta ĉiujn viajn ternojn enhavataj en via korpo, aŭ ĉu vi ricevos novajn ternojn?

— Vilhelmo, ne turmentu min per viaj demandoj. Mi diras al vi, eliru ...

— De kio devenas la terno?

— Mi ne scias ... Vilhelmo mia, jam ... —

— Kio kaŭzas, ke iuj homoj, kiam ili ternas, diras "hap-ci", kaj aliaj "hap-cu"?

— Vilhelmo, se vi ne eliros tuj ...

— Mi tuj eliros. Patrino mia, Petro diris, ke, se mi do-

nos al li moneron, li ternos per sia orelo. Ĉu tio estas kredebla?

— Ne, tio ne estas ebla.

— Ĉu vi certe scias, ke tio ne estas ebla?

— Jes, mi certe scias. Sed nun ne demandu plu, ĉar ...

— Kiu klarigis vin pri tio ĉi?

— Pro la ĉielo! mia filo, silentu!

— Kara mia patrino, en kio konsistas la terno?

— Vilhelmo, se vi eldiros eĉ unu vorton ...

— Kio okazos, se mi eldiros ankoraŭ unu vorton? Ĉu vi volas terni?

Vilhelmo senprokraste sciiĝis pri ĝi. Li plore ekkriis pro ricevo de ŝatinda vangofrapo.

FATALA AVENTURO

Barono Lumpowski eniris en negocejon de porcelanaĵvendisto, por aĉeti donacon por sia "amata" bo-patrino, okaze de ŝia morgaŭa nomtago.

En la negocejo li trovis la majstron en tre malbona humoro.

— Nu, majstro, kio okazis? Vi estas kolera ...

— Jes, sinjor' barono. Mia servanto rompis karan flor-vazon, ĵus ricevitan, kiu kostis 500 kronojn. Jen, tie kuŝas ĝiaj pecoj; rigardu ilin kaj juĝu mem, ĉu mi ne havas kaŭzon je kolero.

Barono Lumpowski longe rigardadis la disrompitajn pecojn, dume diabla ideo venis en lian cerbon.

— Majstro, mi aĉetas tiujn ĉi pecojn. Diru la koston.

— Ne moku, via barona moŝto. Kial vi bezonus tiun elbalindaĵon?

— Ne zorgu pri la kaŭzo, majstro, — parolis la barono per nedubeble certa tono. — Mi nepre volas aĉeti ilin.

— Bone; pagu do kvin kronojn por ili, respondis la komercisto.

Barono Lumpowski pagis. Poste li diris al la majstro:

— Volu enpaki la pecojn en lignan keston. Morgaŭ matene mia lakeo venos al vi, por forporti la pakaĵon.

— Laŭ via ordono, sinjor' barono.

La barono foriris. Reveninte hejmen, li ordonis al la lakeo, ke li morgaŭ matene alportu la pakaĵon, kaj kiam li ĝin enportos en la salonon, li faletu kaj faligu teren kvazaŭ "senintence" la tutan alportitaĵon.

— Nu, — pensis la barono, — la aferon de la nomtaga donaco mi lerte aranĝis.

La morgaŭan tagon ĉio okazis laŭ la ordono de la barono. La lakeo, kiel improvizita aktoro, tre kontentige ludis la komedion; enirante la salonon, kie kunestis la gebaronoj kaj la bopatrino, li faligis la keston, kaj oni aŭdis la tinton de la florvazo.

Vekriado de la bopatrino, insultoj de la barono sekvis.

Barono Lumpowski, ridetante en sia spirito je la bona prosperinta "aranĝo", malfermis la keston. Ekvidinte ĝian enhavon, li preskaŭ svenis pro surprizo; ĉar li terure konstatis, ke la servopreta komercisto enpakis ĉiun pecon en apartan paperon.

LA LETERO

En teatro, dum la plej bela sceno de l'tragedio, oni devis laŭte legi leteron ĵus ricevitan. Sed, ĉar la letero, sur kiu estis skribita la necesa teksto, perdiĝis kaj ne estis trovita ĝustatempe, oni ensendis puran paperon al la aktoroj. La lego estis la devo de la juna heroo. Kiam li rimarkis, ke sur la ricevita leterpapero nenio estas skribita, li palpebrumis al la skatolego de la rememorigisto-diktisto al aktoroj: la suflo. Sed vane. La loĝanto de l'skatolego — sciante, ke oni nun ne bezonas lin, ĉar oni antaŭlegas prete skribitan leteron, — malaperis el sia mallarĝa ejo.

La espero de nia juna heroo fariĝis malespero, ĉar li ne sciis parkere la enhavon de la letero. Tamen li trovis subite savon. Li donis la leteron al sia estonta bopatro.

— Legu tiun ĉi leteron, kara patro; mi kredas, ke ĝi enhavas bonajn sciigojn por ni.

La patro ne konfuziĝis. Li redonis la leteron al la junulo kaj diris:

— Legu ĝin vi mem, mia kara filo; mi forgesis mian okulvitron ...

Tiam la junulo donis la leteron al la fianĉino:

— Legu do vi, mia kara Manjo; mi nun tute ne estas kapabla legi, ĉar miaj okuloj estas larmoplenaj pro la dolĉa ekscito.

La knabino prenis la leteron. Sed kiam ŝi ekvidis, ke la papero estas pura, donis ĝin al la patro kaj diris:

— Tamen estus pli bone, se vi legus ĝin, patreto. Mi tuj iros en la alian ĉambron por serĉi viajn okulvitrojn.

Kaj ŝi foriris. La du viroj atendis ŝin, kredante, ke ŝi volas serĉi kaj alporti la skribitan leteron. Ili atendis jam longe, sed vane. La knabino, staranta inter la kulisoj, rigardadis ilin ridetante.

Subite la patro kolere ekkriis:

— Ha! mia filino ne trovas la okulvitron. Mi devas iri por helpi al ŝi en la serĉado.

Kaj li, foriranta, metis la leteron en la manon de l'juna heroo.

Post longa, senpacienca, vana atendo subite venis sava ideo en lian cerbon. Li kriis al la foririntoj:

— Envenu, karaj miaj, mi aranĝos saĝe la aferon.

Ili time envenis.

— Mi jam tralegis la leteron, — daŭrigis la juna heroo, — ĝian enhavon mi rakontos al vi morgau.

Kaj ili senĝene daŭrigis la ludon.

MALFACILA FACILIGILO

Foje, post vizito ĉe unu mia amiko-samideano en Francujo, mi vojaĝis reen en mian loĝurbon, Parizon. Enirinte la vagonon, mi trovis en ĝi junan sinjoron oscedanta pro soleca enuigo. Kiam miaj okuloj alkutimiĝis al la laca lamplumo de l'vagonfako, mi rimarkis Esperantistan steleton en lia butontruo. Oni facile povas prezenti al si mian ĝojon, ĉar mi, hungaro, neperfekte parolas la francan lingvon.

— Bonan vesperon, sinjoro, — mi diras al li, proponante manpremon.

Reciproka ekĝojiĝo, interbabilado, k. t. p.

Dum la halto de la vagonaro ĉe unu stacio mi eliras el ĝi por trinki glaseton da biero. Post mia reenvagoniĝo mi proponas al mia kunvojaĝanto fari la samon, ĉar "tie oni servas eksterordinare bonan bieron".

— Mi ne kuraĝas elvagoniĝi, — respondas li, — ĉar mi timas, ke mi ne retrovos mian vagonon.

— Rigardu ĝian numeron.

— Jes, sinjoro, sed mia cerbo estas tre malrememorema, mi ĉiam forgesas numeron.

— Ho, kara mia, oni devas fiksi la numeron al ia kona-

ta historia aŭ simila fakto. Jen ekzemple, la numero de nia vagono estas 1038. En tiu jaro mortis Sankta Stefano, la unua reĝo de mia lando. Revenante do mi pensis pri la morto de Sankta Stefano, kaj mi tuj retrovis mian vagonon.

— Bonega ideo! — li ekkriis kaj forlasis la vagonon.

Post kelkaj minutoj oni donas signon por ekirigo de l'vagonaro. Mia franco ne estas ankoraŭ reveninta. Mi elrigardas tra la fenestro por serĉi kaj voki lin. Kaj kion mi vidas kaj aŭdas?

Li, ekscitite, preskaŭ plorante petas la deĵorantan policiston sur la perono:

— Sinjoro, pro la ĉielo, mi vin petegas, diru al mi, en kiu jaro mortis Sankta Stefano, reĝo de Hungarujo?

BAGATELOJ



KONFORMA RESPONDO

Inter aliaj aferoj la parolanto diras:

- Kial do faras nenion la gloraj viroj de nia patrujo? Kial ili restas malvarmaj, senmovaj, rigidaj?
- Ĉar ili estas bronzfanditaj.

DEZIRO

— Jen estas, kara sinjorino, miaj versaĵoj. Legu ilin post mia morto.

- Mi dankas vin kaj deziras, ke vi tre longe vivu.

MODESTA

La fianĉo: Mi povas konfesi al vi, mia karulino, ke mi ricevas kiel monatan salajron nur cent frankojn. — Ĉu tio estos sufiĉa?

La fianĉino: Sendube mi povos vivi per ĝi. Sed per kio vi vivos?

MALMODESTA

— Pri via plej nova poemo mi aŭdis hieraŭ tre laŭdan opinion.

— Kion?

— Sinjoro demandis, ĉu eble ĝin mi skribis.

EDZIĜO PRO MONO

La edzino: Ha, mia edzo! se mi scius, ke vi edziĝis je mi nur pro mia mono ...

La edzo: Konsoliĝu, mia kara. Mi penas rapide disspezi tiun malŝatindan monon.

FIZIKO

— Se oni lasas kuŝi la feron ekstere, kio okazos je ĝi?

— Ĝi rustiĝos.

— Kaj la oron?

— Oni ĝin ŝtelos.

EN INTERVILAĜA VAGONARO

La veturanto: He, konduktoro! Kio do okazas? Mi devas alveni baldaŭ en la urbon.

La konduktoro: Se vi volas alveni baldaŭ, vi devas pied-iri.

LA SPEGULO



Leĝostudento nokte venis en sian loĝejon tre "provizita" el trinkejo, englutinta kelke da boteletoj. En la sekvinta mateno, li vekiĝis suferante la sekvojn de sia konduto, li do ne vidis tute klare. Li penas trovi sian spegulon por

konstati sian timon pri sia mieno; sed li trovas anstataŭ ĝin sian *harbroson*.

— Fi! je la diablo! — ekkriis li, rigardante en la opini-
atan spegulon, — kiel mi estas *nerazita!*

MOZART MALŜATATA

— Mi demandas do, kial oni tiel laŭdas Mozarton? Kian meriton li havas? Li skribis la "Sorĉan ĉasiston", kaj ne-
nion pli.

— Pardonu, la "Sorĉan ĉasiston" Weber skribis ...

— Ha! Mozart do eĉ tion ne skribis.

SAGA KONSILLO

Vojaĝanto nokte alvenas en fremdan vilaĝon. Li deman-
das la noktan gardiston:

— Diru al mi, amiko, kien mi povus nun iri?

La gardisto respondas:

— Nun, sinjoro, plej bone estus, se vi irus hejmen por
dormi.

TERURA ERARO

Sinjoro ĵus reveninta el sia laborejo, sidiĝas ĉe manĝotablo. Lia edzino alportas la manĝaĵon kuiritan de ŝi mem.

La edzo: Kia fuŝkuiraĵo estas tio ĉi? Ĝia abomena gusto ja naŭzas ...

La edzino: Pardonu, mia kara, mi eraris dum la kuirado, ĉar, pretigante ĝin, en la kuirlibro mi turnis samtempe du paĝojn.

SERIOZE

Vilaĝano forte batadas sinjoreton.

— Mi pensas, — diras tiu ĉi, — ke vi ne agis ŝerce.

— Ho ne, — respondas la vilaĝano.

— Tio vin savas, ĉar mi ne estus tolerinta tiaspecan ŝercon.

KOLEGOJ

La bankiero: Tio ĉi estas friponaĵo! Kiel vi kuraĝas penetri en mian ĉambron?

La mizerulo: Ne koleru, sinjor' bankiero, ni estas ja kolegoj.

La bankiero: Kolegoj?

La mizerulo: Nu, ĉar ni ambaŭ kolektas kapitalojn. La diferenco estas nur, ke vi kolektas jam la duan milionon, — dum mi klopodas ankoraŭ pri la unua.

MALPERMESITA KRIO

Oficisto krias pro io al sia kolego. La oficejestro riproĉas lin:

— Ne krii! Ĉu vi eble kredas, ke vi estas la estro?

— Mi bone scias, ke mi ne estas tiu ĉi.

— Nu, kial do vi krias, kiel bovo?

ĴONGLAĴO

— Ĉu vi volas vidi ian ĵonglaĵon de mi?

— Jes; montru.

— Antaŭ ĉio imagu, ke vi ne estas tie ĉi en Neapolo, sed en Parizo.

— Bone, mi imagas tion ĉi, — respondas la alia, kaj samtempe li vangofrapas la ĵonglonton.

— Nu, kial do vi batis min?

— Ĉu mi batis vin? Kiel mi povus bati vin, se vi estas en Neapolo kaj mi en Parizo!?

BONAJ NAJBAROJ



— Vi nun venas hejmen el la trinkejo, post noktomezo!
Ĉu vi ne hontas pri tio antaŭ la najbaroj?

— Ne, ili min ne vidis, ĉar ili restis ankoraŭ en la trinkejo.

LI NE VOLAS TROUZI

Piedvojaĝanta vilaĝano, trenanta grandan sakon da ter-pomoj sur la dorso, renkontas kaleŝon, sur kiu sidas nur veturigisto, lia konatulo Johano.

— He, Johano, bonan tagon! Permesu al mi sidiĝi sur vian kaleŝon.

— Bone, amiko, sursidiĝu.

La vilaĝano rapide sidiĝas sur la kaleŝon, dum la veturado tenante plue la sakon sur sia dorso.

— Kial vi ne demetas la sakon? Ĝi estas ja grandpeza.

— Mi estas danka al vi kaj kontenta pro tio, ke vi bonvole konsentas veturigi min en via kaleŝo; mi ne volas trouzi vian bonecon per deziro veturigi ankaŭ miajn ter-pomojn.

LA MALPROFITO

Eliaso: Kial vi estas tiel malĝoja? Ĉu vi estas eble malsana?

Natano: Ne, sed tuŝis tre dolore mian koron la predikado de lia rabena moŝto, ke la homo estas kreita el polvo kaj fariĝos polvo.

Eliaso: Idioto! Tio ne estas malfeliĉo. Sed, se oni estus

kreita el oro kaj devus fariĝi polvo: tio estus ja malprofito.

KALKULO

— Diru, amiko, ĉu estas vere, ke vi aĉetis oran horloĝon je partumaj pagoj?

— Jes, mi pagas ĉiumonate po dekkvin rubloj.

— Kiam vi ĝin aĉetis?

— Antaŭ kvar monatoj.

— Vi do ŝuldas sesdek rublojn.

LA BONA LOĜEJO

— Nun mi havas bonan loĝejon. Mi devas nenion pagi por ĝi.

— Nenion? Kiel tio povas esti?

— Nu, mia dommastrino diris, ke mi tiel sentu min en ŝia domo, kiel hejme. Sed ĉiu scias, ke hejme oni ne pagas por la loĝado.

BONKORA BOFILO

La bopatrino svenas.

— Konjakon, konjakon rapide! — ekkrias la bofilo.

Ĉeestanta sinjorino diras:

— Pli bone estus uzi akvon malvarman.

— Jes, jes, — respondas la bofilo, — la akvon malvarman por la bopatrino, sed la konjakon por mi!

PLI GRANDA FRIPONO

Juĝisto demandas ŝtelinton:

— Kiu helpis al vi por tiu rabo?

— Mi ne scias lian nomon, mi konas lin nur per vido.

— Kian eksteraĵon havas tiu *fripono*?

— Li estas simila al vi, sinjor' juĝisto; sed vi estas iom *pli granda*.

LA MORTO TRANKVILA

La edzo estas mortanta. Lia malĝoja edzino plorante staras apud lia lito.

— Mia kara edzino — ĝemas la mortonto, — se vi volas, ke mi trankvile mortu, promesu al mi, ke post mia morto vi ne edziniĝos je Francisko.

— Nu, — respondas la vidviniĝonto preskaŭ dronante en siaj larmoj, —vi do povas trankvile morti; ĉar mi jam promesis min al Georgo.

KORO DISROMPITA

— Vi diris, ke la malfideleco de via fianĉino tute disrompis vian koron. Nu, vi havas tamen bonan apetiton.

— Mi diris la *koron*. Sed mia *stomako* ne estas disrompita.

DUM VESPERKUNVENO

Gasto (ĝENTILE): Via edzo havas ja sufiĉan kaŭzon por esti ĵaluza.

La dommastrino: Kial? Li invitas ĉiam nur malbelulojn kaj malsaĝulojn.

LA PRUVO DE L'KRIMO

La juĝisto montras la bastonegon.

— Ĉu vi konas tiun ĉi bastonegon?

— Mi ne konas ĝin.

— Obstina fripono! vi baldaŭ vidos, mi instruos vin konfesi. (AL LA GARDISTO): Konduku lin reen en la malliberejon ...

La sekvintan tagon:

— Ĉu vi konas tiun ĉi bastonegon?

— Jes, sinjor' juĝisto, mi konas ĝin.

— Fine! Tion mi aŭdas volonte. Nun rakontu al mi, kiel vi ĝin konas?

— Vi montris ĝin al mi hieraŭ.

STRANGA KONSOLO



La edzo: Tiu ĉi ĉapelo ne estas bela.

La edzino: Tamen aĉetu ĝin, mia kara edzo; mi ja ĝin ne portos longatempe.

TUTE SENTIME

En kafejo, sinjoro rimarkas, ke kliento sin preparanta foriri, prenas lian vintran surtuton.

— He! kion vi volas fari el mia surtuto?

— Ĉu ĝi apartenas al vi? Mi kredis, ke ĝi estas la propraĵo de alia.

LA NELEGEBLA SKRIBO

Kornelino: Imagu, kara amikino, la juna kuracisto de nia familio skribis al mi leteron aman. Sed mi ne estas kapabla legi lian skribon. Provu, eble vi povos deĉifri ĝin.

Malvino: Tiu ĉi letero estas ankaŭ al mi nelegebla. Sed montru ĝin al *apotekisto*, li certe legos ĝin.

NE EMBARASEBLA

Sinjoro elpelas vojaĝanton-vinmakleriston.

Sed vane, ĉar post kelkaj momentoj li reaperas.

— Kia aroganteco estas tio ĉi? — ekkrias la sinjoro. — Mi vin elpelis antaŭ du minutoj, kaj vi denove prezentiĝas!

— Pardonu, sinjoro, vi elpelis min pro ruĝa vino, — sed nun mi intencas proponi al vi blankan vinon.

LA LIBRAMANTO

— Vi havas efektive belegan kolekton da libroj. Volu al mi prunti kelkajn por legi.

— Ho, mia kara, tion mi ne faros. Oni kutimas ne re-doni pruntitan libron.

— Estas vere. Sed diru al mi, ĉu via libraro konsistas ankaŭ el libroj prunte-prenitaj?

DELIKATA PALATO

— Julino, — diras sinjoro Pufliĉek al la servistino, — al-portu kruĉon da vino; sed antaŭe lavu ĝin per vino, ĉar alie mi sentus, ke iu trinkis akvon el ĝi.

E. D.

Henrikino rigardas la novan ringon de sia amikino. Rapide ŝi diras:

— Kion signifas la literoj E. D. gravuritaj en la ringo? Ha! vi ricevis ĝin de sinjoro Edmondo Dreller?

— Ne, — respondas ŝi ruĝiĝante, — ili signifas nur: "Efektiva Diamanto".

TIMO



- Mi tre timas la tagon de la lasta juĝo.
— Ĉu eble via konscienco estas malbona?
— Ne, sed mi ne povas elporti la sonoradon de l'trum-
petoj.

ANTAŬ JUĜISTARO

La juĝisto: El kia kaŭzo venas, ke via rakonto tute ne similas tiun de via kolego.

La kulpulo: Verŝajne li ankaŭ mensogas.

LA NIGRAJ BOVINOJ

— Vidu, mia fileto, tiuj ĉi estas bovinoj. Tiuj ĉi donas al la homoj la lakton.

— Ĉu ne vere, la nigraj bovinoj donas la kafon?

ARGUMENTO

La juĝisto: Ĉu la juĝato estis plenebria, kiam li batis sian kolegon.

La atestanto: Ne; ĉar mi aŭdis, kiam li faletis, ke la vino *plaŭdas en li*.

STRANGA KOMPRENO

La sinjorino: Sed Lina, kiel vi povas legi gazeton, kiam la infaneto tiel bruege ploras!

La servistino: Ho, sinjorino, ĝia ploro ne ĝenas min en la lego.

NEBONIGEBLA

La advokato: Vi do volas fariĝi mia sekretario. Bedaŭrinde mi vin ne povas akcepti, ĉar vi estas preskaŭ surda, — vi respondas je ĉiuj miaj demandoj per la vortoj: "kion vi diris?"

La sekretario: Kion vi diris?

RUZA

— Kial vi donis libertempon al la lakeo dum la tuta daŭro de l'antaŭtagmezo?

— Ni verŝos post tagmezo vinon en botelojn; li trinku je siaj propraj elspezoj.

GRANDA BUŜO

La dentisto: Volu malfermi la buŝon.

La paciento malfermas ĝin.

La dentisto: Ho, ne tiel grande.

La paciento: Mi pensis, ke vi intencas enkonduki en ĝin la dentotirilon.

La dentisto: Sendube, sinjoro; sed mi mem intencas ja resti ekstere.

LA VERDIRANTO

— Kio estas en tiu botelo? — demandas vojaĝanto en vagonaro kunvojaĝantan samurbanon.

— En tio estas fluidaĵo, per kio oni fariĝas verdiranto.

— Ha! mi amus provi tion ĉi.

— Volu do trinki iom da ĝi.

— Ha! hu! — diras li naŭze post trinko, — ĝi estas ja vinagro.

— Jes, — respondas tiu ridetante, — jen vi fariĝis verdiranto.

LA FUŜLABORO

Botfaristo riproĉas sian helpanton:

— Kia laboro estas tio ĉi? Kiel ofte mi diris jam, ke vi orde faru ĉion! Se mi volus havi tian fuŝlaboron, mi povus mem fari ĝin.

ŜANĜITA RESPONDO



- Morico, ĉu vi dormas?
 — Ne.
 — Pruntu al mi kvar rublojn.
 — Mi jam dormas.

SEVERECO

La vilaĝa juĝisto: Mi punas vin je kvindek heleroj, ĉar vi, kontraŭ la malpermeso, almozon petadis.

La malriĉegulo: Mi petas vin konsideri, ke mi havas nur tridek sep helerojn.

La juĝisto: Rapidu do por almozkolekti la mankantajn dek tri helerojn.

LA DOTO

— Nu, kiam edziniĝos via filino?

— Kiam mi havos kvincent kronojn; ĉar mi donos al ŝi tion kiel doton, kaj mi havas nur ducent kvindek.

— Tio daŭros eble tre longe. Sed faru tion ĉi: forprenu la duonon de l'doto.

— Mi kore dankas vin pro via saĝa konsilo, sed mi mem estas tiel prudenta. La malbono estas nur tio, ke mi havas nur tiujn ducent kvindek kronojn, kiujn mi intencas forpreni.

FIERE

La makleristo: Ĉu vi volas asecuri vian karan vivon?

La poeto: Ho amiko, mi ne bezonas tion, mi estas ja senmorta.

LI NE ESTAS KULPA

— Vi estas obstina kulpulo. En la dek jaroj, de kiuj mi estas la prezidanto de la ĉi tiea juĝistaro, ni renkontis unu la alian jam dek fojojn en la juĝejo.

— Ho, sinjor' prezidanto, mi ja ne estas kulpa pro tio, ke vi tiel longe ne progresis en via ofico.

LA PAŜTISTO

Pastro instruas vilaĝajn infanojn en la lernejo.

— Miaj infanoj, — diras li, — mi estas por vi tia, kia paŝtisto estas por la ŝafoj. Diru al mi, Julo, kion li faras por la ŝafoj?

— Li tondas ilin.

PROPORCIE


Advokato bedaŭrante diras al sia kliento, kiu pro kalumnio estas punata per kelkaj tagoj en malliberejo:

— Vidu, nun vi estos punata dum ok tagoj pro kelkaj vortoj.

— Nu, — respondas la kliento, — proporcie vi meritis

almenaŭ tri jarojn de punado pro via longa defenda parolado.

RIPROĈO



La tajloro kolere diras al sia ŝuldanto:

— Vi promesis antaŭ ses monatoj, ke via riĉa onklo baldaŭ mortos. — Kaj jen, — li vivas ankoraŭ.

TRANKVILIĜO

La kuracisto: Via malfeliĉo estas tre granda ...

La malsanulo (TIME): Nu?

La kuracisto: Via dekstra piedo devos esti detranĉita.

La malsanulo: Dankon al Dio! Vi tre terurigas min. Mi pensis, ke trinkado de brando estos al mi malpermesata.

MALKOMPRENO ĈAGRENIGA

En kafejo sidas Alekso kaj Ludoviko. La hundo de Alekso kuŝas ĉe la piedoj de Ludoviko.

Ludoviko: Forvoku vian hundon de tie ĉi; mi sentas jam, ke puloj rampas sur mia kruro.

Alekso (AL LA HUNDO): Venu tien ĉi, Fifi, ĉar tiu sinjoro havas pulojn.

NEEBLA

La instruisto: Otmaro, se vi ankoraŭ longe lernados tiel malbone, la haroj de via patro blankiĝos antaŭtempe pro la malĝojo.

Otmaro: Tio ne povos okazi.

La instruisto: Kial ne, malbonulo?

Otmaro: Ĉar mia patro portas artefaritan hararon.

SUR LA RIVERO

—Sankta ĉielo! La boato renversiĝas! Ni estas tuj mortontaj!

— Ho ne, mi povas naĝi.

— Sed mi ne povas.

— Mi montros al vi kiel fari.

SURPRIZO

La filino: Patro mia, kion vi deziris, jen tio fariĝis: nun mi estas tute kapabla kuiri. Sed mi petas nun pri la surprizo promesita.


La patro: Tre volonte, mia kara. — En la proksima monato mi forsendos la kuiristinon.

SENKULPIĜO

La sinjorino: Hontu! Por alporti unu kilogramon da salo vi prenis tiel longan tempon.

La kuiristino: Pardonu, sinjorino, mi alportis du kilogramojn.

PROTESTO



La patro: La barono volas edziĝi je vi, kaj mi donis al li mian konsenton.

La filino: Sed patro! La barono estas jam tre maljuna por mi.

La patro: Maljuna? Kial? Li estas ankaŭ por vi 68-jara, kiel por la aliaj.

LOGIKO

— Mia hundo estas tiel inteligenta, ke oni povus diri: ĝi estas duonhomo.

— Nu, tiam vi estas duobla hundo.

INSTIGO

A. (MALLAŬTE AL B., KIU PROMENAS KUN SIA EDZINO): Mal-feliĉulo! kiel vi povis edziĝi je tiu ĉi maljuna, malbelega, lama kaj ĝiba virino?

B.: Vi povas paroli laŭte, ĉar ŝi estas eĉ surda.

EN VAGONARO

La sinjoro: Mi rimarkas, fraŭlino, ke la fumo de cigaro malplaĉas al vi.

La fraŭlino: Jes, sinjoro, ĝi malplaĉas al mi.

La sinjoro: Kial do vi ne sidiĝis en vagonon por nefumantoj?

LONGEDAŬRA

— Sinjoro Schwartz, vi trompis min. Vi diris al mi, ke ĉi tiuj ŝtrumpoj havas longedaŭran koloron. Kaj jen ĝi jam forlasas ilin; miaj piedoj estas tute bluaj.

— Vi nur bezonas lavi viajn piedojn per varma akvo.

— Tion mi provis jam, sed vane; la bluo ne malaperis.

— Mi do estis prava: ilia koloro estas ja longedaŭra.

POTENCO DE LA SCIENCO

Kun gajaj kolegoj festenis kuracisto. Li estis jam tute ebria, kiam iu vokis lin rapide al malsanulo. Tre malfacile li aliris kaj sidiĝis sur la randon de l'lito.

— Donu vian manon, — li diras; sed erare, anstataŭ ĝin preni, li prenis la *sian* kaj palpis al si la pulson.

— Kio? malsana? — ekkrias li subite. — *Ebria* estas tiu ĉi sentaŭgulo.

* * *

La saĝulo en malsaĝa societo estas sveda alumeto sen frotilo.

INTER AMIKINOJ



— KREDU AL MI, KARA AMIKINO, KE PRO MI UNU JUNULO SINMORTIGIS.

— ĈU EBLE ONI VOLIS LIN DEVIGI, KE LI EDZIĜU JE VI?

LA PSEŬDONIMO

— MI SKRIBAS POR LA GAZETOJ ĈIAM NUR PSEŬDONIME.

— CERTE ESTAS IO BELA DE VIA FLANKO, TIA RESPEKTO POR LA FAMILIA NOMO DE VIA PATRO.

HO VE!

Edzo atendas sian edzinon sur la stacio. Li vidas terure, ke venas kun ŝi ankaŭ lia bopatrino. Li sekrete diras al la edzino:

— Ĉu mi ne skribis, ke vi ne alportu al mi vian patrinon?

— Certe. Sed precize ŝi volas paroli kun vi pri tio; ŝi legis la leteron.

NAIVAJ VILAĜANOJ

Vilaĝano (AL SIA EDZINO): Aŭskultu. Ĉar ni estas nun tie ĉi en la urbo, mi proponas, ke ni iru kune en la teatron hodiaŭ.

La edzino: Ne, ne! mi legis sur la afiŝo de l'teatro, ke la tria akto okazas du semajnojn post la dua. Nu, mi ne scias, ĉu ni tiam havos tempon por reveni eh la urbon.

LA FREMDA LINGVO

La barono: Mi kontraktus volonte kun vi; sed, ĉar vi konas nur la hungaran lingvon, mi ne povas vin akcepti.

Mi bezonas lakeon, scianta kelke da fremdaj lingvoj, ĉar ni vojaĝos en eksterlandon dum la sekvonta monato.

La lakeo: Volu diri al mi, via barona moŝto, kien vi iros?

La barono: Parizon.

La lakeo: Nu! se mi en Francujo parolos hungare, tio estos ja fremda lingvo por la Parizanoj.

ĜENTILE

— Nu, sinjor' profesoro, kiel plaĉas al vi la fortepiana ludado de mia filino?

— Mi kredas, ke ekzistas multe da preseraroj en la muziknotoj.

DUOBLA SIGNIFO

— Ĉu vi faris tiun ĉi pentraĵon?

— Jes, amiko.

— Nu, estu trankvila, mi tion komunikos al neniuj.

SIMILECO

- Rigardu, sinjorino, kiel malbelega estas tiu knabineto.
— Tiu? tiu estas mia filino.
— Ho ... pardonu ... Mi devus esti rimarkinta tuj la similecon.

LI ESTAS PRAVA

La juĝisto: Ĉu mi ne ofte diris jam al vi, ke vi ne prenu la propraĵon de aliaj?

La juĝato: Sed, sinjor' juĝisto, — ĉio apartenas al aliaj!

FALSA ĜOJO

La patro (VIDVA): Ĉu vi scias, filino, ke nia kuiristino baldaŭ edziniĝos?

La filino: Estas tre dezirinde, ke tiu malbela, malsaĝa virino foriru de ni. Je kiu ŝi edziniĝos?

La patro: Je mi mem.

MONTRO MALPRECIZA



La fraŭlino: Ĉu vi povus montri, kie estas la loko, en kiu, dum la pasinta jaro, fraŭlo savis el drono knabinon, kaj ili baldaŭ geedziĝis?

La fraŭlo: Tiu loko estas tie; sed mi ne povas naĝi.

KIOM LI RICEVUS?

Vilaĝano asekuris sian domon kontraŭ la fajro. Kiam li ricevas la kontrakton de l'asekuro, li demandas:

- Kiom mi ricevus, se mia domo brulus morgaŭ?
- Nu, — diras la asekuristo, — vi ricevus certe tri aŭ kvar jarojn de puno en malliberejo.

SENKULPIĜO

La sinjorino: Ne, Lucino, vi estas senorda. Jen la polvo tiel plenigis la meblojn, ke ilia koloro ne estas plu divenebla, — kaj la vitroj de l'fenestroj estas tiel malpuraj, ke ili ne estas plu diafanaj. Tiu ĉi malpuraĵo ekzistas jam almenaŭ de ses semajnoj.

La ĉambristino: Mi do ne estas kulpa pro tio, ĉar mi servas tie ĉi nur de unu monato.

LA ASTRONOMIO FACILA

— Estas tamen granda kaj admirinda la potenco de la scienco. Ekzemple, la astronomiistoj estas kapablaj perfekte kalkuli antaŭe, kaj por multaj jaroj, la eklipsojn de la suno kaj de la luno.

— Ha, silentiĝu. Por tiu kalkulo ili ne bezonas sci-encon, — ili ĉion trovas en la kalendaro.

BONA ĈASANTO

— Mi ne povas precize vidi, ĉu tio estas leporo aŭ ŝtipo.

— Pafu, amiko, kaj se post pafado ĝi restos tie, vi scios, ke ĝi estas ŝtipo.

FIDELA SERVISTO

— Kion do vi faras? — demandas sian serviston kuracisto, vidante, ke li batas knabon.

— Pacienton por vi, sinjoro, — respondas la servisto.

NEIMAGEBLA

La profesoro: Imagu, ke vi trinkas unu glason da akvo ...

La kandidato (INTERROMPAS): Pardonu, mi estas tute ne kapabla ĝin imagi.

DES PLI BEDAŬRINDA



—Ĉu vi aŭdis pri la malfeliĉo, Johano Aŭgusto?

— Ne ...

— La filo de Olavo-Aŭgusto dehakis la dikfingron de sia maldekstra mano.

— Ho, la kompatindulo! Li, kiu ĉiam per ĝi enbuŝigis al si la suĉmaĉtabakon!

KRITIKO

—Ĉu vi estis en la galerio de pentraĵoj?

— Jes.

— Ĉu vi vidis mian pentraĵon?

— Jes.

- Nu, kiu parto plej plaĉis al vi?
 — Ĝia kadro.

SAGACA EDZINO

Turka historio

”Hassan kaj Ali, du malpaciĝintaj eksamikoj, ambaŭ estas kulpaj en farado de publika skandalo; ili estas do juĝataj:

”*Hassan*, maljunulo, pasia pipfumulo, ne tabakfumu dum tri semajnoj;

”*Ali*, junulo, nova edzo de sola virino, ne interkisiĝu dum tri semajnoj.

”La efektivigo de tiu ĉi juĝo estas lasata al la bona konscienco de la juĝitoj.”

 Tiel kruele juĝis la saĝega *kadi* (TURKA JUĜISTO).

La juĝitoj malĝoje foriris. La juna Ali, por ne esti tentata ”rompi la juĝon”, enloĝiĝis en apartan ĉambreton, neniun akceptante ĉe si.

Post tri tagoj la juna edzino de Ali, la bela, ĉarma Leila, deziris paroli neprokrasteble kun sia edzo.

— Kion vi volas? — kriis Ali, ne permesante ŝin eniri la ĉambron. — Foriru! Mi ne volas fariĝi juĝrompinto ...

— Tamen mi devas ion tuj komuniki al vi.

— Diru do rapide kaj poste foriru.

— Mi volas nur sciigi vin, ke la maljuna Hassan iradas en sekretan kaŝejon kaj tie li fumas pipon.

REKOMENDINDA

La malsanulo: Ĉu vi povos eltiri tiun ĉi denton? Mi pensas, ke ĝi enradikiĝis tre forte.

La dentisto: Trankviliĝu, sinjoro, ĝi nepre elvenos, se eĉ via tuta makzelo devus kun ĝi elŝiriĝi.

ALUDO

A.: Kiam mi renkontas la maljunan oficiston, mi ĉiam pensas pri vi.

B.: Kial do?

A.: Nu, ĉar ankaŭ li ŝuldas al mi kvin markojn.

SEVERA DUELO

— Ili faris la duelon kun tre severaj kondiĉoj. La spaco inter ili estis nur dek paŝoj.

— Terure! Kaj kiom da fojoj ili pafis?

— Neniom; ili duelis ja per glavo.

NEATENDITA RESPONDO



La fraŭlo: Via frato estas vere prudenta, klera, grandmerita homo. Tre volonte mi konsentus lin havi kiel mian bofraton.

La fraŭlino: Bedaŭrinde vi ne havas fratinojn, je kiu li povus edziĝi.

ANTAŬ MAGAZENO DE JUVELISTO

La edzino: Rigardu tiujn ĉi juvelojn. Kiaj briloj, kia fajreco! Ili preskaŭ suferigas la okulojn ...

La edzo: Vi estas prava; ni do foriru.

DANĜERA VUNDO

Sinjorino negrave pikis sian fingron. Kun teruro ŝi rapide sendis la servistinon por serĉi kuraciston. Tiu ĉi, alveninte, tre koleris, ke pro tia bagatelo li estas alvokita.

— He! — li diris al la servistino, donante al ŝi recepton, — rapidu, tre rapidu al apoteko, por alporti tiun ĉi kuracilon.

— Je Dio! — diris kun teruro la sinjorino, — ĉu la vundo estas tiel danĝera?

— Ne, — respondis la kuracisto, — sed se ŝi ne tre rapidos, vi resaniĝos antaŭ la alporto de l'kuracilo.

LA MALUTILECO DE L'TABAKO

— Kiel multe oni predikas pri la malutileco de l'tabako! Mi ne kredas ĝin. — Ekzemple mi konas maljunegulon,

kiu ĉiam fumis tabakon dum sia tuta vivo, li estas tamen sana kaj havas nun la aĝon de 90 jaroj.

— Konvinkiĝu, sinjoro, ke, se li ne estus fuminta, li estus nun jam 95-jara.

NUNTEMPA SERVANTINO

La sinjorino: Vi ne havas bonajn atestojn.

La servantino: Sed mi havas multajn.

TRAFITA FAZANO

Kelkaj sinjoroj partoprenis ĉasadon en densa arbaro. Inter ili junulo fanfaronema, multespera. La junulo ekvidas fazanon. Li prenas sian pafilon kaj pafas.

— Trafita! trafita! — li ekkrias ĝoje. — Mi vidis, ke unu ĝia plumo flirtis malsupren.

— Kaj mi, — respondis alia ĉasanto, — vidis, ke ĉiuj ĝiaj ceteraj plumoj flirtis supren.

ZORGO

Malsana sinjoro trankvile dormas. La lakeo lin vekas.

— Kio estas? kio okazis? kial vi vekis min? — demandas la sinjoro.

— Sinjoro, nun estas la horo, ke vi englutu unu dormigan pilolon.

VORTLUDO

A.: Kie estas viaj infanoj?

B.: Ili pasigas la someron en apudmara vilaĝo.

A.: Kaj kion ili faras tie?

B.: Ili kolektas konkojn sur la marbordo kaj ludas per ili.

A.: Ili do *konkludas*.

NOBLE

Grafino (AL VILAĜANO): Vi agis efektive tre laŭdinde. (AL SIA LAKEO): Alfredo, premu la manon de tiu ĉi homo.

EN MEZAFRIKO



La gentestro: Mil diabloj! Kial do atendigas min tiel longatempe la kuiristo? Kial li ne alportas mian tagmanĝon? Kie li estas?

La adjutanto: Havu la favoron rememori, via reĝa moŝto, ke hieraŭ vi formanĝis la kuiriston.

MALKARA

La horloĝisto: Rebonigi tiun ĉi horloĝon mi ne konsilas al vi, ĉar vi elspetus por la rebonigo tiom, kiom vi pagis por la horloĝo mem.

La kliento: Ho, tre volonte mi akceptas la kondiĉon: la horloĝo estas al mi donacita.

ĈU BEDAŬRO?

Sinjoro Petro renkontas sinjoron Paŭlon.

— Paŭlo! amiko! Vi estas tiu? Kia surprizo! Mi ja legis en ĵurnalo, ke vi mortis.

— Ne mi, sed mia frato.

— Ho, kiel domaĝe!

EKSCITEBLA

La kuracisto: Mi malpermesas la trinkon de ekscitantaj trinkaĵoj. Vi povos trinki nur solan akvon.

La malsanulo: Sed min ekscitas eĉ la sola vido de l'akvo.

KOMISIO

En oficejo kolportisto montras siajn komercaĵojn.

— Tranĉilo, tondilo ...

Neniu respondo.

— Monujo, alumetoj, cigaringo ...

Neniu vorto.

Li estas foriranta, kiam oficisto diras:

— Mi petas ion de vi.

La kolportisto returnas sin, kaj la oficisto daŭrigas:
— Volu, elirante, diri al la pordisto, ke alifoje li ne permesu kolportistojn enveni tien ĉi.

OBEO NAIVA

La kuracisto: Nu, kiel fartas la maljunulo?

La vilaĝano: Li estas en la puto.

La kuracisto: Kio? kie? en la puto? Ĉu vi frezeniĝis?

La vilaĝano: Ĉu vi mem ne diris, ke ni donu al li la kuracilon en puta akvo?

LETERA FRAGMENTO

...kaj se Vi ankoraŭ skribos al mi tian malĝentilan leteron, mi ĝin resendos al vi sen malfermo.

MALBONA PAŜO



— Nu, kio okazis al via dekstra mano?

— Dum la lasta nokto, revenante el la trinkejo, mi "surpaŝis" najlon.

LA ESPERO

— Ha fraŭlino! Ĉarmulino! mi amegas vin, mi adoras vin freneze!

- Parolu kun mia patro.
— Kiel? Ĉu mi povas do esperi?
— Sendube, sinjoro; mia patro estas kuracisto por frenezuloj.

BONEGA SENDAĴO

La redaktoro: Via lasta sendaĵo estas tamen bonega.

La junulo: Vere? Mi do petas vin forgesi la leteron, en kiu mi hieraŭ skribis, ke mi ne laboros plu por via gazeto.

La redaktoro: Sed mi parolas precize pri tiu letero.

PETO

- Amiko, proponu al mi 50 frankojn pri mia bovido.
— Mi ne estas frenezulo. Mi ne bezonas vian bovidon ... Kial do mi proponus pri ĝi 50 frankojn?
— Mi intencas morgaŭ vendi ĝin en la foiro; kaj mi volus tie povi ĵuri, ke "iu proponis al mi hieraŭ 50 frankojn pri ĝi".

ĈIU ESTAS PRAVA

Kramer: Volu aŭskulti, sinjor' juĝisto, mi havas en mia korto pomujon, kies unu branĉo transfleksigas en la korton de Kremer; kaj li ĉiam prenas por si la pomojn, kiuj defalas de mia pomujo. Mi pensas, ke la fruktoj, kiujn mia arbo produktas, apartenas al mi.

La juĝisto: Vi estas prava, Kramer.

Kremer: Sed mi pensas, ke la pomoj, kiuj falas en mian korton, apartenas al mi.

La juĝisto: Ankaŭ vi estas prava, Kremer.

La sekretario (INTERDIRANTE, AL LA JUĜISTO): Estas ja afero nebla, ke ambaŭ interprocesantoj estu pravaj!

La juĝisto: Ankaŭ vi estas prava, sinjor' sekretario.

TEORIO KAJ PRAKTIKO

La patro: Fileto, vi tre malgajigis min per via nova mensogo; — ĉesigu tiun malbelegan kulpon, ĉar ĝi estas la ĝermo de ĉiuj pekoj. Ne mensogu, eĉ se la diro de l'vero estus malutila al vi. Promesu, ke en la estonta tempo vi ĉiam parolos kun vereco.

La filo: Mi ĝin promesas, kara patio.

La patro: Bone. Kaj nun rigardu al la pordego, kiu so-

norigas; — kaj se tiu estas la tajloro venanta por mono, diru al li, ke mi ne estas hejme.

LA KOMENCO



La juĝisto: Ĉu vi ĉeestis je la komenco de l'batalado inter geedzoj Simono?

La atestanto: Jes.

Simono: Li mensogas, sinjor' juĝisto.

La atestanto (AL SIMONO): Kio? ... mi mensogas?! — Ĉu mi ne ĉeestis je via edziĝa festo antaŭ dek ok jaroj?

MALSAMAJ MOTIVOJ

Sinjorino kolere diras al sia servistino:

— Ha, vere, mi dungos alian servistinon!

— Tion vi tre ĝuste faros, — respondas la servistino, — ĉar tie ĉi troviĝas sufiĉe da laboro por du servistinoj

KIU MORTOS?

— Aŭdu, edzineto, por kio ni havus do tiel grandan loĝejon, solaj kaj maljunaj, kiel ni nun estas?

— Ho jes, kara edzeto, se iu el ni mortos antaŭ la alia, tiam mi akceptos luantojn.

LA DAŬRIGO

— Ej, ej, Aleksandro, ankaŭ hodiaŭ vi estas ebria!

— Vi eraras; ĉar mia ebrieco ne estas hodiaŭa, sed daŭrigo de la hieraŭa.

EL LA SOLDATEJO

Serĝento insultas maltrafadintan soldaton:

— Infero kun ĝia diablaro! vi, sentaŭg ulo! vi, kiu tiel malŝparas la kuglojn..

— Sed, mi ŝparas la celtabulojn.

KIU BEDAŬRU?

— Nu, vi tamen edziĝis je la belega Klarinjo? ... Mi bedaŭras ankoraŭ nun, ke mi ne edziĝis je ŝi pli frue, ol vi ŝin edzinpetis.

— Ho, kolego, mi certigas vin, ke pri tio ĉi vi ne bedaŭras pli multe, ol mi.

LA UNUNOMBRO

Sincere mi povas diri al ci, ke ni agis malsaĝege, ne akceptante la proponon de ...

— He, mi petas cin, parolu en la unu nombro!

— Volonte. Do, *ci* agis malsaĝege ...

ĈU MEMFIDO?

— Mia edzo estas tro memfida. Li imagas pri si, ke li estas tiel saĝega, kiel Sokrates.

— El kio vi konkludas tion?

— Ĉar li ĉiam nomas min Xantippe.

DUSENCA

Maljuna arbaristo flatas la junan baronon: — De la tempo, kiam via barona moŝto sola havas la rajton ĉasadi en tiu ĉi bieno, la leporoj ŝatinde multiĝadas.


BONA RESPONDO

Vilaĝa notario devis ion sciigi rapide al la distrikta juĝisto. Ne trovinte alian homon, li sendis al tiu la porkpaŝtiston kun letero.

— Ĉu ne ekzistas pli saĝaj homoj en via vilaĝo? — demandis kolere la juĝisto.

— Ho jes, — respondis la porkpaŝtisto, sed ili estas senditaj al pli saĝaj sinjoroj.

LA PLEJ FREŜA NOVAĴO



La elefanto kiel duŝaparato.

* * *

Bela virino bezonas belan veston; malbela virino — pli belan.

* * *

La ĉiutagaj gazetoj estas elektraĵoj de l'mensogo.

PRECIZECO

— Se vi havas 25 prunojn kaj vi manĝos 7 el ili, kio restos?

— 18 prunoj kaj 7 kernoj.

NETRINKEMA

— La kuracisto ordonis, ke dum tri monatoj mi ne trinku vinon. Tio estos tre malfacila.

— Ho ne, amiko. Unu fojon dum kvin monatoj mi trinkis nur lakton.

— Vere? En kiu epoko?

— Tuj post mia naskiĝo.

KOMENTARIO

Profesoro: Oni *scias* el la historio de l'mondo, ke la lokon de l'naskiĝo de Homero oni *ne scias*.

ĈE LA KURACISTO

Aliras buĉisto al kuracisto.

— Mi ne scias, kio fariĝas en mi. Antaŭe mi manĝis pli multe ol lupo, mi laboris pli multe ol bovo, vespere mi estis pli laca ol hundo, nokte mi dormis pli bone ol urso; kaj nun ...

— Amiko, turnu vin al bestkuracisto.

LA KIALO

— Mi tre bedaŭras, sinjor' restoraciisto, ke mi ne vespermanĝis tie ĉi antaŭ ok tagoj ...

— Tio faras al mi plezuron.

— Jes, ĉar tiam eble tiu ĉi viando estis freŝa.

KOREKTO

La patro: Nu, kion vi vidis en la bestoĝardeno?

Emilino: Ni vidis unu grandan azenon.

La patro: Vere? Kaj kiel granda estis tiu azeno?

Emilino: Ĝi estis tiel granda, kiel vi, mia patreto.

Paŭlino: Ho, malsaĝulino, — en la tuta mondo ja ne ekzistas tiel granda azeno, kiel la patreto.

LA LEĜA PERSEKUTISTO



Karolino: Ha, amikino, imagu, kiel feliĉa mi estas! — Hodiaŭ vizitis min la juna leĝa persekutisto ...

Bella: Kaj vi ĝojas pro tio?

Karolino: Tre kompreneble, amikino; li min edzinpetis.

KONATULOJ

— Bonan tagon, Rudolfo!

— Bonan tagon, Adolfo!

- Mi ne estas Adolfo.
- Kaj mi ne estas Rudolfo.

POTENCO DE L'KUTIMO

Sinjoro Hummel, ĵurnalisto, edziĝis. La kutimo profesia tiel enradikiĝis en li, ke li stenografiis la paroladon de l'pastro dum la ceremonio.

EN TEATRO

Sinjoro diras al sinjorino, kiu estas ĝuste antaŭ li:

— Mi tre petas vin, volu demeti vian ĉapelon; mi ja tiel nenion vidas.

La sinjorino ofendiĝante respondas:

— Ĉu mia bela, nova ĉapelo estas nenio?

VERDIRO

- Nu, kion diris al vi la orakolistino?
- Ke ili forlogos de mi la monon.
- Kaj forlogis iu?
- Jes, la orakolistino mem.

KIA RAPIDECO!

Intervilaĝa vagonaro haltas en loko senstacia. Post reve-turo, unu vojaĝanto demandas la konduktoron pri la kaŭzo de l'halto.

— Unu bovino staris inter la reloj, ni do devis ĝin for-peli.

Post kvarono da horo la vagonaro denove haltas.

— Kial do ni devas halti denove? — demandas la sama vojaĝanto.

— Ĉar denove inter la reloj staras *tiu* bovino.


MALFRUO

Maljuna, nebela fraŭlino iras en la ĉambron de pentrar-tisto.

— Majstro, mi aŭdis, ke vi serĉas konvenan modelu-linon por via pentraĵo de Venuso. Mi proponas min. Ĉu mi venas tro malfrue?

— Jes, almenaŭ dudek jarojn.

TRANKVILIGO



La ŝuisto: Nun estus vere la tempo por pagi vian ŝuldon. Mi ne povas tiel ofte fari tian longan vojaĝon ...

La ŝuldanto: Trankviliĝu. La proksiman monaton mi venos loĝi en via ĉirkaŭaĵo.

KIO ESTAS TIMINDA

La patro: Ne timu de la hundo, mia filo, — ĝi ne koleras. Rigardu, kiel afable ĝi balancas sian voston.

La filo: Sed mi ja ne timas ĝian voston, sed ĝiajn dentojn.

EN PROMENADO

Diru al mi, kial vi portas tiun ĉi malpuran, ĉifitan, disŝiritan ĉapelon?

— Mia edzino diris al mi, ke se mi metos tiun ĉapelon sur mian kapon, ŝi ne kunvenos promeni kun mi.

SE LI ESTUS SCIINTA

La plendanto: Sinjor' juĝisto, tiu ĉi homo tiel mokis kaj ofendis min, ke mi estus tolerinta pli volonte vangofrapon.

La denunciito: Kial tion vi ne diris ĝustatempe?

SENTA TROMPIĜO

Studento, post kolosa, tutnokta vinamuziĝo, en la fruaj horoj de l'mateno venas hejmen, en terure ebria stato. Li kuŝiĝas vestita sur liton, kun la piedoj sur la kuseno kaj kun la kapo sur la porpieda fino de la lito.

Post kelke da horoj li vekiĝas, kaj, vinvaporume ankoraŭ, rimarkas sian turnitan kuŝan situacion.

— Ha! — li murmuris, — mi pensis, ke mia kapo doloras; kaj jen mi vidas, ke miaj ŝuoj premeblas ...

SIMILECO

— Mi renkontis hieraŭ sinjoron, kiu estis konfuzeble simila al vi.

— Neeble!

— Tiel simila, ke li eĉ petis de mi prunton da dek frankoj.

MOKO

— Ĉu vi bone sukcesis en via scienca parolado?

— Jes, la aŭdantoj aŭskultis mian tutan paroladon kun malfermita buŝo.

— Ha! ili do oscedis.

PLI OL ...



— Knabetoj, sendube vi estas fratoj?

— Ne, ni estas ĝemeloj.

* * *

La kiso estas la lingvo internacia de l'amo.

* * *

La laŭdo de beleco de l'edzino estas pera laŭdo de
bona gusto de l'edzo.

REBATITA FANFARONO

— En niaj vesperkunvenoj oni aŭdas la kantojn de plej famaj kantistinoj.

— Ankaŭ en la niaj, ĉar ankaŭ ni havas fonografon.

MALICA

— Mia edzo ĉiam pretendas, ke li edziĝis je la plej bela fraŭlino de la urbo.

— Ha! Ĉu li estas bigamiulo?

EN RESTORACIO

— Kelnero, donu al mi porcion da fiŝaĵo kun saŭco. Aŭ ne! mi prenos prefere bovaĵon, ĉar mi ne fidus je viaj fiŝoj; via mastro aĉetas malfreŝajn fiŝojn mortintajn.

— Ho, sinjoro, ĉu vi pensas, ke ni eble aĉetas bovojn vivantajn?

MATEMATIKO

La instruisto: Diru al mi, Andreo, se via patro elfinas ian laboron dum du horoj, kaj via onklo elfinus la saman laboron dum tri horoj: dum kiom da horoj elfinus ili ambaŭ kune la saman laboron?

Andreo: Ili absolute ne elfinus ĝin; ĉar kiam miaj patro kaj onklo estas kune, ili neniam laboras, sed disputas.

LAŬ KONSILO DE KURACISTO

— Mi timas, ke mi ne estos kapabla eltrinki *la trian litron* da vino; kvankam mi nepre devas eltrinki ĝin hodiaŭ.

— Kial do?

— Ĉar mia kuracisto ordonis, ke mi trinku pli malmulte da biero ol da vino, — kaj mi jam trinkis hodiaŭ du litrojn da biero.

KAŬZO

— Tie iras Milo Trilla, la nova operetkantistino; — ŝi plaĉas al mi pli multe sur la strato, ol en la teatro.

— Tion mi kredas tial, ĉar sur la strato ŝi ne kantas.

BONKORA

Knabineto: Patrino, hodiaŭ unu malgranda knabino falis en la lernejo; ĉiuj knabinoj ridis je ŝi, sola mi ne.

Patrino (ŜIN KISANTE): Tio ĉi montras, ke vi havas bonan koron. Kaj kial vi ne ridis?

Knabineto: Ĉar la falinta knabino *mi* estis.

DIVERSAJ ARGUMENTOJ

— Nu, kia novaĵo? — demandas la bankiero de sia kontoristo.

— Du sinjoroj deziras pruntepreni monon de vi. Nome, barono Hipotekoviĉ deziras dek mil rublojn.

— Hipotekoviĉ? Mi ne donas al li, ĉar mi *ne konas* lin.

— Cetere, grafo Malŝparowski ...

— Malŝparowski? Mi ne donas al li, ĉar mi *konas* lin.

EFIKO

— Mi aĉetis, laŭ la konsilo de kuracisto, gutojn, kiujn mi enmiksas en la kafporcion de mia edzo, por dekutimigi lin de la trinkado de vino.

— Kaj nun li ne trinkas plu? — Ne, li ne trinkas plu — kafon.

ĈIKANO



— Karolino diris al mi, ke vi diris al ŝi tiun sekreton, kiun mi diris al vi, kaj pri kiu mi diris, ke al neniuj diru ĝin.

— Ho, ŝi, la sentaŭgulino! Kiam mi diris al ŝi la sekreton, mi diris al ŝi, ke vi diris al mi, ke mi al neniuj diru ĝin; kaj mi diris al ŝi ankaŭ, ke ŝi ne diru al vi, ke mi diris ĝin al ŝi.

— Bone, mi pardonos. Mi diros al ŝi, ke mi ne diris al vi, ke ŝi diris al mi, ke vi diris la sekreton al ŝi; do, ne diru

al ŝi, ke mi diris al vi, ke ŝi diris al mi, ke vi diris ĝin al ŝi.

FANFARONO

Du vaguloj interparolas:

— Jes, amiko, mia patro mortis pro la bono de l'patrolando.

— Kiamaniere?

— La ekzekutisto pendigis lin.

KIEL VENKI MALHELPON?

— Vi devas leviĝi el la lito ĉiumatene je la kvara horo.

— Ho, sinjoro kuracisto, mi absolute ne estas kapabla leviĝi pli frue, ol je la oka.

— Hm, ĉu vi povus leviĝi pli malfrue. ol je la oka?

— Jes, tre volonte.

— Bone. Leviĝu do ĉiutage unu horon pli malfrue, — tiamaniere post dudek tagoj vi leviĝos je la kvara matene.

POST TRIDEK MIL JAROJ

La antikvuloj kredis, ke sur la tero, post ĉiu periodo de 30.000 jaroj, la aferoj okazintaj ree okazas laŭ sama vico.

Gaja kolegaro, konsistanta el junaj fraŭloj, estis festeninta kolose en hotelo. Kiam venis la tempo pagi, unu el ili diris al la hotelisto:

— Sinjoro, ĉu estas vere, ke ni post 30.000 jaroj kunvenos kaj festenos ree en tiu ĉi loko?

— Sendube, sinjoro.

— Nu do, volu noti la koston de nia nuna vespermanĝo; ni ĝin pagos al vi tiam kun danko.

— Tre volonte, miaj sinjoroj. Sed ĉar vi jam vespermanĝis en mia hotelo *antaŭ* 30.000 jaroj, kaj tiam lasis nepagita la saman ŝuldon, mi petas, ke vi pagu nun la koston de l'tiama vespermanĝo.

LAŬVORTE

Leŭtenanto Pavliĉek (AL SIA SERVANTO): Iru al sinjoro ĉefleŭtenanto Preŝkules, kaj diru al li, ke hodiaŭ vespere mi atendos lin por trinki tason da teo, — kaj se li diros, ke li venos, alportu 50 cigaredojn.

La servanto (AL ĈEFLEŬTENANTO PREŜKULES): Sinjoro leŭtenanto Pavliĉek tre volonte atendos vin hodiaŭ vespe-

re por trinki tason da teo, — kaj se vi venos, alportu 50 cigaredojn.

KOMUNA DEZIRO



La edzino: Mia patro ĉiam diris, ke li estus preferinta, ke mi estu filo.

La edzo: Nu, tion ĉi mi ankaŭ preferus.

VORTLUDO

— Mi jam konas turojn konstruitajn el ŝtono, el ligno, eĉ el porcelano: sed mi ne aŭdis ankoraŭ, ke oni konstruis turon el pizoj ...

— ?

— Jes! mia filo raportis al mi hodiaŭ pri tio ...

— ??

— Jes, jes! Li lernis en la lernejo, ke en Italujo ekzistas *Piza turo* ...

KONSEKVENCO

La kuracisto malpermesis al malsanulo trinki vinon kaj fumi tabakon. Poste, kiam tiu ĉi resaniĝis iom, la sama permesis al li fumi, sed nur per longa tubo de pipo, por ke la varma fumo ne kaŭzu malbonon al li.

— Ĉu vi permesas al mi, sinjor' doktoro, ke mi trinku same vinon per longa kolo de botelo?

DONACO MERITITA

La aŭtoro: Nu, jen estas por vi du ŝilingoj, ĉar vi redonis al mi la manuskripton de mia perdita verko.



La trovinto: Vi povus doni pli multe, ĉar mi eĉ tralegis ĝin.

ONI PAROLAS FREMDLINGVE

En la hungara ĉefurbo, Budapest, okazis la sekvanta amuza historio.

Spicvendisto vidis la sekvantan surskribon sur la enirejo de alia spicvendisto, lia konkuranto:

ENGLISH SPOKEN

— Kion signifas tiuj strangaj vortoj? — li demandis.

— Tio signifas: "oni parolas angle". Mi havas anglan helpanton.

— Hm, — rediris la demandinto, — tion mi ankaŭ faros. Mi havas germanan helpanton, kaj mi mem ankaŭ parolas germane.

— Mi ankaŭ. Sed la kapableco paroli germane ne estas fanfaroninda; preskaŭ ĉiu dua komercisto en Budapeŝto ja parolas germane.

— Ha! bona ideo! Mia filino parolas france, — li ekkriis ĝoje, kaj rapidis hejmen, por desegni la glorigan surskribon.

Kaj la sekvintan tagon la preterirantoj mirigite legis la

kuriozan surskribon sur la pordo de nia saĝa spicvendisto:

FRANZÖSISH SPOKEN

RIMEDO



— Nu, mi ne esperas, ke vi ricevos sufiĉe da doto por pagi ĉiujn viajn ŝuldojn.

— Domaĝe, mi devos verŝajne du fojojn edziĝi.

ESPERIGA

Kliento de barbiero, dum razado, rimarkas, ke granda hundo de l'barbiero atente sidas antaŭ li.

— Kion volas tiu ĉi hundo?

— Ho, sinjoro, ĝi ĉiam sidas tiel atente antaŭ la razatoj, ĉar kutime ĝi ricevas la pecojn, kiujn oni detranĉas de la orelo de l'klientoj.

DEFENDO

La makleristo por edzeco: Mi povas al vi sincere proponi tiun ĉi knabinon. Ŝi estas virta ...

La sinjoro: Ha, ĉesigu do; la nunepokaj knabinoj ...

La makleristo: Pardonu, sinjoro, — tiu ĉi fraŭlino ne estas nunepoka knabino.

INTER MALLABOREMUĴOJ

— Aŭdu, kolego, tiu Ivan Aleksandroviĉ Mallaboroff estas neatingeble entuziasma samideano.

— Kion li faris?

— Demandu prefere: kion li *ne* faris? ... Do, li rakon-

tis al mi, ke, dum la pasinta nokto li *laboris* en sonĝo. Nun, pro timo, li ne kuraĝas plu kuŝiĝi.

SINCERECO

La gasto: Josefo, mi deziras hodiaŭ manĝi ion bonan.

La kelnero: Nu, atendu iom, post unu horo mi havos libertempon; tiam mi vin kondukos en alian restoracion.

LI JA SCIAS

A.: Jes, sincere mi povas diri, ke via kuzo estas fripono ...

B.: Ki ... kion vi kuraĝas diri pri li? Mi iros tuj al li kaj sciigos lin pri tio.

A.: Ho, ne estas necese; li ja scias tion.

MALVASTA PANTALONO

Rekruto: Sinjoro serĝento, tiu ĉi pantalono estas malvasta por mi.

Serĝento: Tio ne povas esti vera. (AL LA ROTESTRO): Donigu nur duonporcion da nutraĵo al tiu ĉi homo!

KONSILO

La malsanulo: Sinjor' kuracisto, mi trinkis erare venenon anstataŭ brandon ...Kion fari?

La kuracisto: Testamenton.

EMBARASA DEMANDO



Ernesto revenas plorante el la lernejo hejmen. Lia bonkora patrino terurigante demandas:

- Kial vi ploras, fileto?
- Ĉar la sinjor' instruisto batis min.
- Pro kio?

- Mi ne estis kapabla respondi je unu demando.
- Kaj kio do estis tiu demando?
- Li demandis, kial mi enpikis pinglon en lian seĝon.

SAGA POLICISTO

Je l'alveno de la vagonaro iu krias sur la stacio:

— Sinjor' Tanisto! Tanisto!

Vojaĝanto scivole klinas sian kapon el la fenestro; tuj la kriinto rapidas tien kaj vangofrapas lin. La batito faras kompreneble grandan bruon kaj plendas pro la bato al policisto tien veninta.

— Ĉu vi estas sinjor' Tanisto? — demandas la policisto la vojaĝanton batitan.

— Ne, mia nomo estas Rozulo.

— Nu, kial vi do bruadas? La bato ja ne apartenas al vi!

KONSENTO

La onklo: Kara nevo, la konstanta drinkado kaj la serioza lernado ne povas ja paralele kuniri ...

La nevo: Vi estas prava, kara onklo; mi ĉesigas do la seriozan lernadon.

LI NE ESTAS PRAVA

— Vi trinkas la vinon tiel, kiel la akvon.

— Ho, vi ne estas prava. Mi ne tiel trinkas la akvon.

LA REFELIĈIGILO

— Ha! mia riĉa onklo estas malsaĝulo! Mi skribis al li leteron dirantan, ke mi havas tiom da malfeliĉo, ke miaj haroj jam blankiĝis, kaj mi petis lian helpon. — Kaj kion li faris? ... Li sendis al mi boteleton da harkolorigilo.

LA DIFERENCO

— Donu al mi bileton por bano.

— Kian? Por kvindek aŭ por tridek kopekoj?

— Kia diferenco estas inter ili?

— Dudek kopekoj.

NEREPACIGEBLA

Filipo estas malsanega. Li faras sian lastan religian konfeson.

— Mia filo, — diras al li pie la pastro, — mi scias, ke vi estas en interkolero kun Bernardo. Vi nepre devas repaciĝi kun li, se vi deziras ricevi pardonon de Dio por viaj pekoj.

Laŭ konsento de Filipo oni venigas Bernardon, kaj la malamikoj repaciĝas.

Post la foriro de Bernardo, Filipo demandas:

— Ĉu ne vere, via pastra moŝto, ke por la okazo, se mi resaniĝos, tiu ĉi repaciĝo estos nula?

EN KONCERTO

La dando (AL SIA APUDULO): Ĉu vi ne trovas, sinjoro, ke la versaĵo deklamata estas tute sensenca?

La sinjoro: Mi ne estas kompetenta ĝin kritiki, ĉar mi estas ĝia aŭtoro.

La dando (KONFUZITE): Ho, sinjor' poeto, mi malĝuste esprimis mian penson; mi volis diri, ke la malgrasa junulino tute fuŝege deklamas ĝin.

La sinjoro: Ha, ŝi estas mia filino ...

La dando (ANKORAŬ PLI KONFUZITE): Pardonu, sinjoro, via filino estas ĉarma; sed mi parolas nur pri tiu malgracia, dika maljunulino, kiu ŝin akompanas per la fortepiano.

La sinjoro (VANGOFRAPANTE LA DANDON): Jen al ci, bubo! Kial ci kuraĝas ofendi mian edzinon?

ŜI KONSENTUS



La patrino: Konfesante la veron, kara filino, la inĝenieron havi kiel bofilon tre plaĉus al mi.

La filino: Mi havus nenion por kontraŭdiri, se mi ne estus via sola filino.

LA PLUVOMBRELO

— Redonu al mi la pluvombrelon, kiun antaŭhieraŭ mi pruntedonis al vi.

— Pardonu, amiko, mi ne povas, ĉar Petro hieraŭ gin

pruntepetis de mi. Sed kial vi ĝin bezonas? Hodiaŭ ja ne pluvas.

— Ĉar Marcelo, kiu ĝin pruntedonis al mi, repostulas ĝin, por povi ĝin redoni al la pruntedoninto, kiu estas devigata ĝin tuj rehavigi al ĝia proprajulo.

LA KURIGILO

Cigano demandas sian amikon:

— Konsilu al mi ion, amiko. Jen mia ĉevalo, ĝi ne volas plu kuri.

— Atendu iom, mi metos fajran meĉaĵon en ĝian oreilon.

La ĉevalo pro la bruldoloro bleke ekkuris, kuregis tiel rapide, ke la cigano ne estis kapabla ĝin sekvi.

— Amiko, — sin turnis la cigano al la konsilinto, — por povi atingi mian ĉevalon, bonvolu meti pecon da meĉaĵo ankaŭ en mian oreilon.

SUR LA STRATO

— Kio okazis? Via vizaĝo estas plena je gratvundoj.

— Mi razas min mem kaj la sinrazarton mi lernis el lernolibro.

LIMIGITA DEZIRO



— Ho, se bonega Dio havigus al mi kvindek mil frankojn! mi fordonus tuj la duonon de ili por la malriĉuloj ... Sed se vi, ho kara Dio, dubas pri tio, donu al mi nur la dudek kvin milojn, kiuj devos resti miaj.

MALO

- De kiu vi ricevis tiun ĉi beletan mopsidon?
— De Kajetano.
— Ŝatinda donaco. Ŝajnas, ke li vere amas vin.
— Aŭ ke li vere malamas la mopsidon.

ŜAJNO

La negocestro: Tiu ĉi novdungita laboristo ŝajnas tre diligenta.

La teĥnika direktoro: Jes, tion diris al mi ankaŭ lia antaŭa estro.

La estro: Ke li estas diligenta?

La direktoro: Ne, sed ke li ŝajnas tia.

VORTLUDO

A.: Hieraŭ, dum la ĉasado, mi paftrafis uron, tiel bone, ke la kuglo penetris ĝuste en ĝian galon.

B.: Vi povus tion ĉi diri pli simple: "Hieraŭ mi paftrafis urogalon."

KONVENA DONACO

— Vi donacis cigartranĉilon al Luciano? Li ja ne estas fumulo.

— Ĝuste tial; ĉar tiu cigartranĉilo estas tute difektita.

DISTRITE

La juĝisto (AL JUĜOTO): Ĉu vi edziĝis?

La juĝoto: Ne, mi estas fraŭlo.

La juĝisto: De kiom da tempo?

TROMPINTA ANTAŬVIDO

La kuracisto: Ĝoju, sinjorino, en la stato de via edzo okazis mirinde bona ŝanĝo.

La sinjorino: Ĉu li ne mortos?

La kuracisto: Ne, li baldaŭ resaniĝos ... Sed ... Ĉu vi ne ĝojas?

La sinjorino: Jes, mi ĝojas. Sed vi tiel certigis min hieraŭ pri lia tre baldaŭa morto, ke pro tio mi vendis ĉiujn liajn vestojn.

REBATO

La pentristo: Mi volonte aŭdus vian opinion pri mia nova pentraĵo.

La rigardinto: Sincere mi povas diri, ke ĝi ne estas ŝatinda.

La pentristo: Jes, mi scias, ke ĝi ne estas ŝatinda, tamen mi dezirus ĝin aŭdi.

NI NE RAPIDU

La malliberejestro demandas krimulon, antaŭ lia ekzekuto, ĉu li deziras, ion.

— Nu, — diras la morte kondamnito — mi volonte manĝus persikojn.


— Persikojn! Sed ni estas en januaro! Ili malbaldaŭ maturiĝos.

— Ne estas grava; mi atendos.

LA MALSATA HEROO


aŭ: Okazaĵo en la Muzeo

I.



En la vespero.

II.



En la mateno de l'sekvinta tago.

LA TRINKMONO

Riĉega bankiero veturis unu fojon per fiakro kaj donis unu frankon kiel trinkmonon al la fiakristo. Li malkontente diris al la riĉegulo:

— La filo de via moŝto havas la kutimon ĉiam kvin frankojn donaci ...

— Ho, mia bona, — respondis la bankiero, — li povas tion fari tre facile; li havas riĉegan patron.

LAŬ LA LOKOJ

— Ha, via grafa moŝto, vi estas tie ĉi, en la ĉefurbo? Kaj en tia malnova, eluzita vesto!

— Kial ne? Estas io tre komforta portadi ĝin, kaj en la ĉefurbo neniu konas min.

— Sed vi ĝin portadas ankaŭ hejme.

— Nu, kial ne'? Hejme ja ĉiu min konas.

NEMERITITA SUSPEKTO

— Kial vi ploras? — demandas la sinjoro la ĉambristinon.

— La sinjorino diras, ke mi ŝtelis dek du kulerojn arĝentajn.

— Ĉu tio ne estas vera?

— Ho ne, sinjoro, — respondas ŝi, — unu jam delonge mankis el la dekduo.

LA ŜTALO

La barbiro razas sian vilaĝan klienton per malakra razilo. La kliento toleras tion iom da tempo, sed fine demandas:

— El kio estas fabrikita tiu ĉi razilo?

— El ŝtalo.

— Ha! nun mi komprenas, kial miaj okuloj vidas fajre-rojn.


KIU PLENDU?

Ekzekutisto akompanas la kondamniton al la eŝafodo. La vetero estas abomena: falas grandega pluvo.

— Kia vetero! — ĝemas la kondamnito.

— Ĉu *vi* plendas pri tio? — rediras malĝentile la ekzekutisto. — Pripensu, ke mi devos ankaŭ *reveni*.

MALVASTA LOKO



- Kial vi intencas vendi vian fortepianon?
— Pro manko de loko.
— Vi havas tamen vastegan loĝejon.
— Jes, sed ĝi ne estas sufiĉe vasta por savi min de l'ulado per fortepiano.

KARA ĜIBO

Edzeczmakleristo: Se tiu ĉi sinjorino ne plaĉas al vi, mi tre proponas la du fratinojn Durand. La pli juna estas efektiva ĉarmulino kaj havas doton da 20.000 frankoj. La pli maljuna havas 40.000 frankojn, sed ŝi havas unu ĝibon.

La edziĝonto: Ĉu ne ekzistas ankaŭ tria fratino Durand kun du ĝiboj?

MALBONA KUTIMO

— Vi havas, edzeto, tre malbonan kutimon: vi ĉiam parolas en via dormo.

— Estas tre ĝuste. Mi ja ne povas paroli dum la tago.

LA IRANTO EN AFRIKON

— Ĉu estas vere, ke vi intencas vojaĝi en Afrikon?

— Jes.

— Kial nun? kun tiu ĉi infera varmo, kiam eĉ en la ombro estas varmeco de 32 gradoj.

— Ĉu mi devos iradi en la ombro?

LA FUNGOJ

La instruisto: Fungojn oni trovas precipe en ombraj, mal-sekaj lokoj ...

Knabo: Ha, nun mi komprenas, kial ili havas figuron de pluvombrelo.

GRANDA KOSTO

— Diru, najbaro, kiom kostis la nova fortepiano, kiun via edzino aĉetis?

— Mian hejman trankvilecon.

EN ENTUZIASMO

Arbaristo: ...La urso estas ja la plej danĝera besto. Se ĝi persekutas iun, li devas nepre morti. Se li forkuras, post li kuras ankaŭ la urso; se li rampas sur arbon, post li rampas ankaŭ la urso; se li saltas en akvon kaj penas sin savi naĝante, post li naĝas ankaŭ la urso ...

Aŭskultanto: Kaj se oni sin kaŝas?

Arbaristo: Tiam kaŝas sin ankaŭ la urso.

LA ESTINTECO

— Ĉu vi efektive ne edziĝos je fraŭlino Terezio? Ŝi estas ja riĉa, kaj ankaŭ ne malbela.

— Sed ŝia estinteco ...

— Mi certigas vin, ke ŝia estinteco estas senmakula kaj pura.

— Ho, amiko, tion mi kredas; sed ĝi estas tre longa.

FACILA HONTO

La pastro: Ĉu vi ne hontas? Ne labori dum la tuta tago!

La mallaborulo: Ho jes, mi hontas.

La pastro: Kial vi tamen ne laboras?

La mallaborulo: Ĉar honti estas io pli facila ol labori.

LA KREDITO

— La prezon de l'ŝuoj mi pagos al vi nur post tri monatoj.

— Tre volonte mi konsentas.

— Kaj kiam la ŝuoj estos pretaj?

— Post tri monatoj.

MALĜENTILE



La kantistino: Jen estas la atesto de l'kuracisto, diranta, ke, pro raŭkeco de mia voĉo, mi ne povas kanti hodiaŭ.

La direktoro: Ke vi ne povas kanti? Pri tio mi ne bezonas ateston.

BEDAŬRO

En malluma nokto iu atakas la mueliston kaj lin kruele batas. Dum la batado la nekonato subite ĉesigas kaj surprize ekkrias:

— Ha, sinjoro, kiu vi estas? Mi ne konas vin. Mi volis alian bati, sed mi tre eraris ...

La muelisto kondolence diras:

— Ho, bedaŭrindulo! Vi nun klopodis vane!

LA NULO

Post noktomezo revenas hejmen la edzo.

Lia edzino riproĉas al li lian malfruecon.

— Sed mia kara, — diras li, — estas nur la deka horo.

En tiu momento la horloĝo sonorigas *unu*.

— Ho, mensogulo! La *horloĝo* mem protestas kontraŭ via diro.

— Konsideru, ke ĝi ne povas sonorigi ankaŭ la *nulon*.

LA DU MALBELULOJ

Sinjoro Malbelegulo elrigardas tra la fenestro de sia loĝejo. Sur la strato iras sinjoro Senbelecuro.

— Bonan tagon, sinjoro Malbelegulo.

— Bonan tagon, sinjoro Senbeleculo.

— Kial vi difektas la belecon de la strata fronto per la elmontro de via abomena vizaĝo? Estus preferinde, se vi reirus en iun angulon de via ĉambro kaj sidigus vian simion ĉe la fenestro.

— Mi jam provis ĝin; sed tiam la preterirantoj tiel salutis al la fenestro: "Bonan tagon, sinjoro Senbeleculo!"

MALĜUSTA KOMPRENO

La sinjoro (KOLERE): Se vi ne tuj foriros, mi vokos mian serviston ...

La kolportisto: Ĉu vi pensas, ke li intencas ion aĉeti?

APENAŬ KREDEBLA

— Mi petegas vin, donacu al mi almozon. En brulado mia tuta kapitalo pereigis.

— Montru la ateston de l'urbestro.

— Pardonu, ĝi ankaŭ forbrulis.

PERSEKUTATA DE LA SORTO



La malriĉgulo: Volu doni ian almozon al homo persekutata de la sorto ...

La sinjoro: Ha, fripono! Vi petadis hieraŭ kiel lamulo, kaj hodiaŭ kiel blindulo!

La malriĉgulo: Vi vidas, sinjoro, kiel min la sorto ĉiam persekutas, — ĉar mi nun precize vin renkontas.

ĈAGRENIGA

La juĝisto: Kiun aĝon vi havas?

La atestantino: Antaŭ tridek jaroj mi komencis rigardi la lumon de l'suno.

La juĝisto: Kaj dum kiom da jaroj vi estis blinda?

MALLONGA KRITIKO

— Ĉu vi estis hieraŭ en la teatro? Mia verko estis tie ludata.

— Jes, mi estis tie.

— Nu, kiu sceno plej plaĉis al vi.

— La fermo de l'kurteno.

FLORKRONA SURSKRIBO

Ĵus vidviĝinto, intencanta meti sur la freŝan tombon de la mortinta edzino florkronon ornamita per surskriba rubando, mendis ĉe presisto preson sur la rubando: "*Ĝis la revido!*"

Post duonhoro li telefone petis la presiston, ke post la vortoj "*ĝis la revido!*" li presu: "*en la ĉielo!*", — se restas ankoraŭ sufiĉe da loko.

Kaj li ricevis la rubandon kun la jena surskribo:

”Ĝis la revido — en la ĉielo, se restas ankoraŭ sufiĉe da loko.”

SATISFAKCIO

Sinjoro membro de la urbestro, dum oficiala kunveno, ekscitite krias:

— Mi konstatas, ke la duono de la urbestro estas idiota.

La urbestro admonas lin:

— Se vi tuj ne retiras vian ofendan diron, mi monpunos, vin.

— Bone, mi retiras. Mi do konstatas, ke la duono de la urbestro ne estas idiota.

STRANGA KOMPRENO

— Kelnero, tio estas koleriga! Mi krias jam la sesan fojon, por ke oni alportu al mi botelon da biero, — sed tute vane.

— Kvietiĝu, sinjoro, ĝi estos tuj tie ĉi. (AL LA SUBKELNERO): Alportu rapide al tiu ĉi sinjoro ses botelojn da biero!

SOPIRO



La lernanto en botfarado: Ho, kiel bonege estos kuŝi en la tombo!

La mastro: Kompreneble! Ripozu, trankvile kuŝi, ne-nion fari, mallaboremulo!

KLARIGO

Izidoro: Via kolo estas pli malpura ol iam.

Leopoldo: Ne, tio ĉi estas nur okula trompiĝo.

Izidoro: Kiel?

Leopoldo: Ĉar mia kolumo estas malpli malpura ol iam.

PRIPENSADO

— Nu, mia filino, ĉu la sinjoro prezidanto ne faris ankoraŭ sian konfeson?

— Ho jes, patreto; sed mi petis de li la templimon de du tagoj por pripensi.

— Ho malsaĝulino! dum du tagoj ja li ankaŭ povos pripensi.

UTILA VETURIGISTO

— He! fiakristo! Kiom mi devos pagi por veturi al la ŝipo-stacio?

— Kvindek kopekojn.

— Dankon. Mi volis nur scii, kiom mi ŝparos, se mi tien piediros.

AROGANTAĴO

Studento eniras en trinkejon, kie li ekvidas sian kreditoron, tajloron.

— Estas vera arogantaĵo tio, kion vi faras!

— Kion do? — demandas la tajloro surprizite.

— Vi manĝas tie ĉi kokinan viandon kaj salaton, — vi trinkas bonegan vinon, — por tiuj vi havas monon! ... sed vi ĉiutage persekutas min pro la dek ŝilingoj, kiujn mi ŝuldas al vi.

RIDINDA ERARO

Dum vojaĝo sinjoro diras al la konduktoro de l'vagonaro:

— Jen, mi donacas al vi unu kronon. Mi intencas dormi en la vagono; mi vojaĝos ĝis Linz, — tie veku min. Sed mi vin avertas, ke mi havas la malbonan kutimon, esti malĝentila kaj neobeema, kiam oni min vekas; do, se mi ne volos vekigi, prenu min kaj elportu min el la vagono.

— Mi komprenas, sinjoro.

Post kelkaj horoj la dormanto vekigaŝ. Ĉirkaŭrigardante li vidas, ke alia vojaĝanto ĉeestas en la vagono. Ili prezentas sin reciproke.

— Kie ni nun estas? — demandas la dorminto.

— Post kelkaj minutoj ni estos en Vieno.

— En Vieno! Neeble! ... Ĉu ni jam preterpasis la stacion Linz?

— Ho, antaŭ tre longe.

La vagonaro haltante, la dorminto venigas la konduktoron.

— Azeno! fripono! kion mi diris? He! Kial vi ne vekis min ĝustatempe? Ĉu mi ne donis al vi trinkmonon? Kanajlo! ...

— Ho sinjoro, — respondas la insultato ridetante, — se vi estas tiel ekscitita, kion diros la vojaĝanto, kiun mi en Linz perforte eltrenis el la vagono anstataŭ vin!

KIA FELIĈO!

— La pasintan nokton ŝtelistoj penetris en mian ĉambron. Ili traesploris la tutan loĝejon, forprenis kelkajn objektojn ...

— Tamen, vi ofte rakontis al mi, ke vi havas ĉe vi ŝargitan revolveron, kaŝitan sub la kapkuseno.

— Feliĉe ili ne trovis ĝin.

LA NEKONATAĴO



Vagulo trovas sur la vojo eluzitan dentobroson. Li ĝin levas kaj mirigite rigardas, dirante al sia kolego:

— Kio povas esti tiu strangaĵo?

— Verŝajne ia luksa sinamuzilo, kiun eltrovis la superklaso.

EN EKZAMENO

La profesoro: Ŝajnas al mi, ke tiu ĉi demando estas malfacila por vi.

La kandidato: Ne la demando, sed la respondo.

VIVOSAVO

La dando monologas:

— Nun mi povas diri, ke mia hundo savis mian vivon: mi vendis ĝin por dek dolaroj.

LA MONO

— Netolerebla estas la agado de mia edzino. Ŝi ĉiam kaj ĉiam postulas de mi monon.

— Kaj kion ŝi faras el la mono?

— Mi ne scias. Mi ja neniam donas al ŝi.

KIAL STALO

— Kaj kiom kostas tiu ĉi loĝejo?

— Ĝi kostas por jaro mil kronojn.

— Ĉu estas en ĝi stalo?

— Ne. Sed kial stalo? Vi ja ne havas ĉevalojn.

— Ne por ĉevaloj, sed por tiu *bruto*, kiu konsentus pagi mil kronojn por tiu ĉi loĝejo.

KIAM TRINKI VINON?

Zorgema patro edukas sian idon:

— Estu ĉiam sobra, mia kara filo. Aŭdu, mi atingis jam grandan aĝon, — kaj, en mia tuta vivo, mi konis nur kvar okazojn por trinki vinon; nome: 1) en malsano, — 2) estante gasto, 3) havante gaston, — kaj 4) se ia alia kaŭzo sin prezentis.

MALLAŬDO

Sinjorino A.: La novaj najbaroj estas ekstreme senordaj. Ili havas nek gladilon, nek filtrilon, nek tekruĉon.

Sinjorino B.: Kiamaniere vi eksciis pri ĉio tio?

Sinjorino A.: Ĉar mi intencis pruntepreni de ili.

LA IDEALO

La edzino: Kara edzo, mia sola idealo estas: havi verdan silkan jupon. Volu aĉeti unu por ml ...

La edzo: Kion vi pensas, mia kara? Mi ne povas esti tiel kruela: senigi vin de via sola idealo.

LA SURTUTO DE L'PATRO

I



— Aŭskultu, fileto. Mi eniros en la alian ĉambron por ludi fortepianon; sed vi ne envenu, ĉar tie ĉeestos kun mi ankaŭ *terurega fantomo*.

* * *

Ne ekzistas tiel granda malsaĝulo, de kiu eĉ la plej granda saĝegulo ne povus ion lerni.

LA SURTUTO DE L'PATRO

II



—Ho Dio! çielo! ... Patro! helpu min.

* * *

La venĝo estas dupinta ponardo: kiam vi vundas per
ĝi vian malamikon, eĉ vi mem vundiĝos.

TROMPO

Du suferantoj de reŭmatismo ĉe la piedo interparolas en banejo:

— Kiel povas esti, ke vi toleras ĉiam sen ia ĝemeto la frotadon de via piedo, kaj mi tiel krias pro la doloro, dum oni frotas la mian.

— Ho, tre simple, — respondas tiu ridante, — mi ĉiam donas al la frotanto mian *sanan* piedon.

MALBONA KONSCIENCO

Komercisto je vinoj eniras en trinkejon, por trinki glason da vino.

— Diru al mi, sinjor' trinkejmastro, de kiu vi aĉetas la vinojn.

— He, ĉu vi ne povas plu memori? Miaj vinoj venas ja el via kelo ...

— Efektive; donu do al mi botelon da biero.

MATENE

— Je kia horo vi revenis hejmen el la trinkejo.

— Je kvarono de la dekdua.

- Vi mensogas. Mi bone aŭdis, ke la horloĝo batis tri.
— Nu, tri estas ja ĝuste kvarono de dekdu.

LA VAGONARO

Gabrielo ne povis kompreni, ke la vagonaron fervojan nek ĉevaloj, nek aliaj bestoj tiras. Li estis tre scivola vidi ĝin; li do iris en la najbaran urbon por rigardi ĝin.

Okaze oni liveris ĉevalojn sur la vagono. Kiam Gabriele ekvidis tiujn, li ekkriis triumfe:

— Ha! mi do tre bone suspektis, ke ekzistas nenia veturilo tirebla sen ĉevaloj.

EN APOTEKO

— Volu al mi doni ian kuracilon kontraŭ maldormo.

— Ĉu vi ĝin bezonas?

— Ne, sed mia edzino; ŝi neniam dormas ankoraŭ, kiam mi nokte revenas hejmen el la trinkejo.

REDIRO



La instruisto: Davido, diru al mi, kiom estas kvinoble ses?

Davido: Tridek du.

La instruisto: Nebone. Diru, Leopoldo.

Leopoldo: Estas dudek ses.

La instruisto: Ankaŭ nebone. Leopoldo, diru al Davido: "vi estas tiel granda azeno, kiel mi."

Leopoldo (AL DAVIDO): Vi estas same granda azeno kiel sinjor' instruisto.

ŜANĜO NEESPERITA

Vagulo eniras en restoracion.

— Donu bonan tagmanĝon al mi *por mia mono*.

Post tagmanĝo li venigis la restoracimastron.

— Mi mendis tagmanĝon *por mia mono*, — diris li kaj donis unu moneron da dek heleroj al la restoracimastro.

Tiu ĉi preparas sin por sendi iun al policejo, kiam venis al li ideo.

— Aŭskultu, — diris li al la vagulo, — mi ne denuncos vin sub unu kondiĉo. Iru en la restoracion nomata "Ora Suno" kaj ankaŭ tie faru la saman ŝercon.

— Tion mi ne povas fari, ĉar tie ĝin mi faris jam; kaj la restoracimastro de "Ora Suno" sendis min tien ĉi.

PRIVILEGIO

Ĉasanto levas sian pafilon por pafi leporon kurantan. La kampogardisto okaze apudestanta diras subite al li:

— Sinjoro! pro Dio! ne pafu!

— Kial do?

— Tial, ĉar tiun leporon la sinjoro grafo ĉasadas ĉiudimanĉe.

ŜI TROVAS DEFENDON

— Vekiĝu nun, filineto. La suno jam brilas super vi.

— Nu, lasu la kurtenojn fali, — ili defendos min.

ORDONO

La sinjoro: Ĉu vi opinias, ke pluvos?

La lakeo: Mi opinias, jes.

La sinjoro: Nu, veku min dek minutojn antaŭ la komenco de l'pluvo.

DIPLOMATIE

La juĝisto: La advokato Spanovski plendas, ke vi diris al li sur la publika strato, ke li estas "fripono rabisto". Diru, ĉu tio estas vera?

La juĝato: Jes, tio estas vera; sed mi ne diris ĝin.

DARVINISMO

La patro: Nu, mia filo, kion vi hodiaŭ lernis en la lernejo?

La filo: La sinjor' instruisto diris, ke la homoj devenis de simio.

La patro (KOLERE): Vi, eble, — sed ne mi.

LA SERĈADO PRI LOĜEJO



En la strato, post noktomezo, Petro renkontas Paŭlon, kiu estas tute ebria.

— Kion vi faras tie ĉi?

— Mi serĉas loĝejon.

— Nekredeble ... Je tiu ĉi horo!

— Jes, amiko; sed ne miru, — mi serĉas *mian propran* loĝejon.

LEONO KAJ TIGRO

En Budapeŝto, kaj preskaŭ en ĉiu granda urbo de Hungarujo, sur anguloj de stratoj staras publikaj servistoj nomataj *hordár*, dungeblaj de la publiko por kia ajn laboro aŭ servo.

Bone vestita sinjoro alparolas unu tian serviston:

— *Hordár*, ĉu vi volas gajni dek kronojn ĉiutage dum kelka tempo?

— Jes, via sinjora moŝto, — respondas la *hordár*. — Kaj kion mi devos fari?

— Preskaŭ nenion.

— ?

— Mi estas posedanto de sovaĝbestaro.

— ??

— Mia leono hieraŭ mortis.

— ???

— Vi anstataŭos ĝin. Vi vestos sur vin ĝian felon, kaj dum la tuta tago vi promenos en la kaĝego, ŝajnigante vin leono.

La *hordár* akceptas la negocon, kaj la saman tagon li komencas sian "oficon".

Jam de unu horo li trankvile promenis en sia kaĝego, kiam subite okazas io terura, neatendita. Oni enirigas tigron en la saman kaĝegon. La *hordár-leono* hombleke vekrias pro mortetimiga teruriĝo, — sed kio okazas? ... La tigo alproksimiĝas al li kaj mallaŭte subdiras en lian orelon:

— Ne timu, kolego, mi ankaŭ estas *hordár*.

ILI NE DUBIS

La sinjoro: Kion vi diris al la tajloro, kiu hodiaŭ matene tien ĉi venis por ricevi monon?

La lakeo: Ke mia sinjoro ne estas dome.

La sinjoro: Ĉu li ne dubis?

La lakeo: Ne, sinjoro; li eĉ diris, ke li estas certa, ke tio ne estas vera.

PLI ĜENTILA

La juna edzino: Mia edzo estas tre ĝentila. Kiam mi kantas, li ĉiam donacas ion al mi.

La maljuna edzino: Mia edzo estas eĉ pli ĝentila. Li donacas ion al mi tuj, kiam mi volas ekkanti, kaj li eĉ ne deziras aŭdi min.

DISTRITA



La edzino (DE PROFESORO): Vi estas tute malseka. Kiel tio povis okazi? Vi ja havis pluvombrelon.

La profesoro: Jes; sed mi pensis, ke vi estas apud mi, kaj mi tenis ĝin ĉiam super vi.

DUONFUNEBRO

Du knabinetoj interparolas:

- Ni estas nun en duonfunebro.
- Vere? Kiu do el vi fariĝis duonmortinta?

LA PAPAGO DE L'ADVOKATO

A.: Kiel fariĝas, ke la papago de l'advokato Bifla konstante diradas: "fripono! fripono!"

B.: Kredeble ĝi tion lernis de liaj klientoj.

PIKA

Du amikinoj interparolas:

— Ha, mia kara, mi estas tiel malkvieta! Aŭgusto promesis, ke li venos hodiaŭ posttagmeze por peti min je edziĝo.

- Ĉu vi timas, ke viaj gepatroj ne konsentos?
- Ne, sed ke li ne venos.

DEZIRINDA KURACILO

— Sinjoro apotekisto, vi diris al mi, ke tiu konjako, kiujn mi aĉetis de vi, estas bonefika kontraŭ ventrodoloro.

— Vere, sinjorino.

— Tion mi ne kredas. Antaŭe mia edzo nur tre malofte suferis pro ventrodoloro, kaj nun li ĉiam plendas pro ĝi.

SEN SUKCESO

Edzo ekiras en la amikarejon.

— Adiaŭ, mia kara, — diras li al sia edzino, — je la sepa horo mi revenos hejmen; sed se mi ne povos veni, mi avertos vin per servisto kun letero.

— Tio estas nenecesa, mia edzo, — ĉar la avertantan leteron mi jam elprenis el via poŝo.

LI NE POVIS

— Hieraŭ, mi veturis per fervojo, kaj en la vagono angla kunveturanto metis dormante la piedojn sur miajn genuojn.

— Nu, kial vi ne vekis lin?

— Mi ne povis, ĉar mi ne scias paroli angle.

TEO KUN RUMO

— Amiko, hodiaŭ vespere mi volonte atendas vin por unu taso da teo. Ĉu vi trinkos ĝin kun aŭ sen rumo?

— Kun rumo, mia kara, sen teo.

LA CELO PRAVIGAS LA RIMEDOJN

— Tiu ĉi sinjoro sidas tuttage en la bierejo kaj drinkas konstante.

— Sed li havas akciojn de la bierfabriko kaj drinkante li kreskigas la dividendojn.

ĈE POŜTO

La poŝtisto: Tiu ĉi letero estas tro peza, — vi devas meti sur ĝin unu markon plie.

La vilaĝano: Sed tiel ĝi estos ankoraŭ pli peza.

KIAL SIN LAVI?



— Eliru do kaj lavu vin antaŭ ol veni al la manĝotablo. Viaj manoj estas ja treege malpuraj.

— Kial lavi min? Mi lavis min en la lasta dimanĉo; mi ja ne estas akvobesto.

KIEL PROGRESI?

La patro: Mi eksciis, mia filo, ke vi estas la lasta en la lernejo.

La filo: Ne malĝoju, kara patro. Se mi estus la unua, mi ne povus progresi.

DELIKATE

- Kion vi pensas pri sinjoro X.?
— Li estas bona, sobra kaj prudenta viro.
— Sed li diras precize la kontraŭon pri vi.
— Estas tre eble, ke ni ambaŭ eraras.

SEVEREGA KRITIKO

- Ha! la redaktoro denove resendis al mi mian manuskripton. Ŝajnas, ke li ne scias, kio estas bona.
— Eble; sed li almenaŭ scias, kio estas *malbona*.

INTER BONAĴ AMIKINOJ

Henrikino: Mi eksciis, ke Petro ricevis la ĉefan gajnon en la loterio. Kaj mi rifuzis lin la antaŭtagon de la lotado.

Leopoldino: Ŝajnas, ke Petro estas bonfeliĉulo. Du tiel bonaj tagoj unu post alia!

LA FELIĈO

La veturigisto de l'luksa kaleŝo subite malsaniĝis. La gebaronoj tamen devas nepre veturi al la stacio de l'vaporŝipo; ili do anstataŭas la malsanulon per la kondukto de l'kamplabora veturilo.

Pro lia mallerteco la kaleŝo renversiĝas en la mezo de l'urbo. Oni facile komprenas la ĉagrenon kaj koleron de l'veturantoj. Sekvas granda riproĉado kaj insultado. Ilin aŭskultinte mute, la veturigisto diras:

— Estas ja feliĉo, ke mi renversis personojn, kaj ne objektojn.

— Ĉu vi konsideras tiun fakton kiel feliĉon? — demandas la barono surprize.

— Sendube, via barona moŝto. Ĉar se mi estus renversinta objektojn, mi nun devus ilin relevi kaj porti, — dum la personoj sin relevas kaj staras per siaj propraj fortoj.

REDONO

Oficiro promenis kun pastro. Ili alvenis al loko, kie staris malnova, ruinigita eŝafodo, ĉirkaŭata de korvoj kriantaj.

— Jen, — diris ŝerce la oficiro, kiel tiuj ĉi malĝentilaj birdoj salutas vin!

— Jes, — respondis la pastro, — ŝajnas, ke ili ĝojas, pensante, ke mi vin portas al ili.

BONA INFANO



La patrino: Mia filo, ĉu vi senŝeligis la pomojn antaŭ ol ilin manĝi.

La filo: Jes, patrineto.

La patrino: Kaj kion vi faris el la ŝeloj?

La filo: Mi manĝis ilin.

KARAJ OVOJ

Reĝo havis la kutimon vojaĝi inkognite.

Unufoje li tagmanĝis ovaĵon en restoracio de provinca urbo, kie la kelnero rekonis lin, sed nenion diris pri tio.

Manĝinte la reĝo volis pagi; la kelnero postulis 100 guldenojn por la konsumita ovaĵo.

— Kion! — ekkriis surprize la reĝo, — ĉu la ovoj estas tiel maloftaj en tiu ĉi regiono?

— Ne, — respondis subdire la kelnero, — tie ĉi la *reĝoj* estas maloftaj.

KOMPENSO

La edzino: Jen, hodiaŭ vi denove ludis kartojn kaj multe perdis per ĝi.

La edzo: Ne riproĉu, kara. Estas vere, ke kelkfoje mi multe perdas, sed aliffoje malmulte. Tiamaniere mia financa stato kompensiĝas.

NETIMINDA RENKONTO

— Transiru ni sur la alian flankon de l'strato. Sur tiu ĉi flanko venas Karlo, al kiu mi ŝuldas tri dolarojn. Mi ne volas lin renkonti.

— Trankviliĝu, amiko, — li nepre transiros sur la alian flankon, ĉar li ŝuldas al mi dek dolarojn.

EN CIRKO

Unu el la rigardantoj demandas la arlekenon:

— Diru, amuzulo, ĉu estas grave, ke arlekeno havu idiotan vizaĝon?

— Kompreneble, sinjoro. Vi eĉ ricevus certe de mia direktoro duoblan salajron.

SIGNO

— Kiel vi fartas, onklo mia?

— Multe pli sane.

— Je kio vi vidas tion?

— Je la mieno de miaj heredontoj.

MALFELIĈO



— Mi eksciis, ke vi refoje ne sukcesis en via ekzameno.

— Ne, kolego. Mi ne havis feliĉon. Mi estis precize demandita pri tio, kion mi ne sciis jam la antaŭan fojon.

LA VIVO

— Vi diris al mi, ke sinjoro Smith jam mortis. Nun mi eksciis, ke li estas en malliberejo. Li do vivas ...

— Ĉu esti en malliberejo estas vivo?

FAMILIA DISPUTO

La edzino: Ho, se mi neniam estus vin koninta!

La edzo: Ho, edzino, vi tro malfrue kompatas al mi!

SENKORA PATRO

La fianĉino: Ho kara Ludoviko, mia patro bankrotis.

La fianĉo: Mi ĉiam diris, ke li estas senkora homo, — kaj jen, li nun malhelpas nian geedziĝon.

EN EKSPozICIO

Klarigisto: Jen estas kiraso, kiu kontraŭstaras ĉian pafilegon ...

Alia klarigisto (EN LA NAJBARA ĈAMBRO): Jen estas pafilego, kiu detruas ĉian kirason.

KONFESO NUNTEMPA

Aleksino: Ĉu la leŭtenanto konfesis sian amon?

Klotildo: Li jam komencis. Hodiaŭ li diris al mi, ke li havas multajn ŝuldojn.

EN KLUBO

— Kion vi farus por liberiĝi de la amikoj, kiuj vin tedus?

— Nu, mi prunteprenus monon de ili.

— Malbona rimedo. Mia rimedo estas: *pruntedoni* al ili.

LA FILO

Malriĉa hebreo volis kristaniĝi. La pastro instruis lin pri la preĝo, sed lia penado restis vana, la hebreo estante tre malinteligenta.

— Nu, mia filo, se vi morgaŭ scios fari senerare la signon de l'kruco, vi ricevos de mi unu sakon da terpomoj.

En la tago sekvanta la hebreo prenis kun si la filon, portanta sakon por la donaco, kaj li eniris en la domon de l'pastro, lasinte sian filon en la korto.

— Nu, faru la signon de l'kruco, — diris la pastro.

— En la nomo de l'Patro, kaj de l'Spirito sankta. Amen.

— He, kie do restis la "Filo"?

— Pardonu, via pastra moŝto, mi lasis lin ekstere; li tenas la sakon por la terpomoj.

AMINDA

Riĉa maljunulo konsentas edzinigi sian filinon kun juna leŭtenanto.

— Tamen, — li diras al la fianĉo, — mi devas vin averti, ke mia filino nenion ricevos dote, sed ŝi estas la sola heredontino de mia tuta havo.

— Ho, — respondas ĝentile la fianĉo, — tio ne malhelpas min: vi ja estas tiel maljuna.

LA DENUNCO

Malbela junulino iras al la vilaĝestro.

— Via moŝto, mi venas por raporti al vi, ke Viktoro hieraŭ kisis min.

— Diru al mi, — demandas la vilaĝestro, — ĉu vi plendas aŭ fanfaronas pri tio?

PRUDENTA



La barono (PLENA JE ŜULDOJ): Nu, Rudolfo, mi donacas al vi tiun ĉi veston.

La lakeo: Mi tre dankas al vi, sinjor' barono. Sed diru, ĉu mi ne estos devigata iam pagi ĝian koston?

LA MALJUNA KOKINO

Sinjoro en restoracio ekmanĝas kokinaĵon, kiun li trovas tre malmola.

— He, kelnero, — li diras moktone, kian aĝon havis tiu ĉi kokino?

— Sinjoro, — respondas la kelnero rigide, — la kokinaĵon ni servas kun laktokrema saŭco, kaj ne kun biografiaĵoj.

FUNDAMENTA PROTESTO

Sinjinino skribas leteron al sia amikino. Dum la skribado ŝi rimarkas, ke Evelin legas la skribatan leteron post ŝia dorso. Ŝi daŭrigas skribante:

”Mi volus al vi skribi ankaŭ sekreton, sed mi nun ne povas, ĉar Evelin staras malantaŭ mi kaj legas mian leteron.”

Evelin kolere diras:

— Tio ne estas vera; mi ne legis vian skribaĵon.

KONTRAŬARGUMENTO

Geamantoj promenas sur la kampo. La junulo varme amindumas, kiam subite bovo sovaĝiĝinta kuregas al ili. Kompreneble, ili timege diskuras, kaj la junulo rampas sur arbon proksiman.

Post foriro de l'bovo la fraŭlino riproĉas lin; — Hon-tu. Vi ĵus diris, ke vi kuraĝus interbatali eĉ kun la mor-to mem ...

— Sed, — li balbutas, — konsideru, ke tiu bovo ja vi-vas.

INFANA PENSO

La malgranda Andreo petas sian patron, ke li aĉetu por li fajfileton.

— Sed vi tiam la tutan tagon fajfados, kaj mi ne havos trankvilecon.

— Ne, patreto; mi fajfos nur dum via dormo.

LA DUA

La juĝisto: Kion faris la juĝato, post kiam li donis al vi la unuan vangofrapon?

La plendanto: Poste li donis la trian?

La juĝisto: La trian? Kredeble vi volas diri la duan?

La plendanto: Ne; la duan *mi* donis al li.

KION LI PENSAS?



— Sinjoro, vi ja havas nek profesion, nek bienon, nek rangon, — tamen vi kuraĝas peti mian filinon. Kion do vi pensas?

— Tion, ke vi, ŝajnas, rifuzos min.

EN LERNEJO

- Nomu al mi ian rampaĵon.
- Akaro.
- Estas bone. Nun nomu al mi alian rampaĵon.
- Alia akaro.

LA KRIO

En la borso du agentoj malpaciĝas.

- Ne kriiu!
- Mi ne kriiu? Kiu krias? Ĉu mi krias? Mi ja ne krias, sed vi krias. Strange! vi krias, kaj vi tion krias, ke mi krias.

SUB LA KRISTNASKA ARBO

- Kial vi ploras, Fredĉjo?
- Mi manĝis mian tutan kukon.
- Nu, tio ne estas kaŭzo por plori!
- Jes, mi kredis manĝi tiun de mia frato.

EN LA JUĜEJO

Juĝisto: Estas tamen mirinde, ke vi forŝtelis la vestojn kaj ne kunprenis la monon el la kaso!

Kulpigato: Mi petas, ne rememorigu min pri tiu mal-lerteco! Mi jam sufiĉe bedaŭris ĝin!

EN BALO

Junulo dancas valson tre malbone. Lia kunulino diras al li:

- Ĉu vi amas danci valson?
- Ho jes, fraŭlino, tre multe.
- Nu, vi devus ĝin lerni.

BONA EKZEMPLO

La patrino: Ci, mallaboremulo! Kial ci ne sekvas la ekzemplon de la diligenta formiko?

La bubo: Mi ja sekvas ĝin: ankaŭ mi baraktas la tutan tagon en sablo.

NAIVE



Antonino: Kara patrino, la sinjor' leŭtenanto kisis min.

La patrino: Kial vi ne kriis por helpo?

Antonino: Li ne bezonis helpon, li povis sola tion fari.

PRECIZIGE

La juĝisto: Diru al mi, atestanto, kiom da tempo vi bezonas por trairi la interspacon inter via domo kaj la trinkejo de l'kulpulo?

La atestanto: Ĉu aliri aŭ reveni?

KATA RUZECO

La instruisto: Diru ian ekzemplon pri la ruzeco de kato.

La infano: Sur la manĝotabloj de restoracio ĝi ofte sin ŝajnigas leporo.

KION MANĜI?

— Nu, edzino, alportu la fiŝaĵon.

— Neeble, kara edzo; ĉar la kato formanĝis ĝin.

— Do la restantan bovidaĵon.

— Ankaŭ ĝin formanĝis la kato.

— Kia malagrabraĵo! Alportu la fromaĝon.

— Pardonu, kara edzo, ankaŭ la fromaĝon formanĝis la kato.

— Mil diabloj! Enfine mi tamen intencas manĝi ion. Alportu do la katon.

LA KIALO

Malfruiĝinta vojaĝonto: Estas vere absurde, ke la stacidomon oni tiel malproksime metas de la urbo.

Fervojano: Tion oni faras nur tial, ke ĝi estu pli proksime al la reloj.

MARĈANDO

— Vi, barono, ŝuldas al mi 40.000 frankojn. Kial do vi ne edziĝas je fraŭlino Hedvig? Ŝi havas 80.000 frankojn da doto. Vi povus el tiu sumo kvitiĝi ...

— Ne, mia kara. Sed mi donas al vi konsilon. Vi mem edziĝu je ŝi kaj el la doto pagu al mi la restantajn 40.000 frankojn.

DISPUTADO

— La saĝulo neniam nepre certigas, ĉiam li dubas. La malsaĝulo kontraŭe ne ŝanceliĝas; li estas ĉiam certa pri tio, kion li diras.

— Hm! ĉu tute vere?

— Ho jes, tute certe.

AGRABLA

La vizitanto: Ĉu fraŭlino Ella estas dome?

La ĉambristino: Ne, sinjoro, ŝi ne estas dome.

La vizitanto: Mi tamen vidis ŝin ĉe la fenestro ...

La ĉambristino: Sed ŝi vidis vin ankaŭ!

DUMKURACISTA KONSULTO

Klientino: Sed, sinjor' doktoro, mi nun elmetis la langon almenaŭ dum kvin minutoj, kaj vi ne ankoraŭ rigardis ĝin.

Kuracisto: Tio ne estas necesa; mi volis nur neĝenate skribi la recepton.

LA MOMENTO

— Ĉu la sinjor' sekretario estas dome?

— Ne ankoraŭ. Sed volu atendi momenton, li revenos post duonhoro.

VANA PENADO



La sinjorino (KOLERE): Ha! vi subaŭskultas tra la ŝlosiltruo.

La servantino (DAŬRIGANTE SUBAŬSKULTI, KUN NATURA MIE-
NO): Jes, sinjorino, sed vane; oni parolas tiel mallaŭte, ke
mi nenion aŭdas el ĝi.

EKSPERIMENTO

La kolportisto: Ĉu vi volas aĉeti okulvitron?

La sinjoro: Montru. (LI METAS ĜIN SUR SIAN NAZON KAJ RI-

GARDAS LA KOLPORTISTON.) Ha! strange! tra la okulvitro mi vidas friponon!

La kolportisto (METAS ANKAŬ LA OKULVITRON SUR SIAN NAZON KAJ RIGARDAS LA SINJORON): Efektive, vi estas prava.

PRAVIGO

— Kial vi ŝtelis tiun ĉi surtuton?

— Pravigu min, sinjor' juĝisto, mi ja ne povis porti plu la mian tiel disŝiritan.

BANADO EFIKA

— Via kara edzino estas do en banejo?

— Jes, sinjoro.

— Ĉu la banado estas efika?

— Jes; mi fartas pli bone.

SINKONO

Du ĉasantoj interparolas.

— Mi vidis jam hundon tiel inteligentan, ke ĝi estis vere pli inteligenta, ol sia mastro.

— Nu, *mi havis* ankaŭ tian hundon.

STRANGA DANKO

Fabrikisto sendis belegan pipon, kiel donacon, al sia advokato. Tiu ĉi sentis grandan plezuron pro la kara sendaĵo, kaj dankis letere la donacinton.

Sed la fabrikisto ne sentis la saman plezuron, kiam li, post la fino de sia proceso, ricevis de l'advokato la kalkulon de l'elspezoj, en kiu inter aliaj rubrikoj li trovis tion ĉi:

Dankletero por pipo kaj poŝta kosto de ĝia sendo
 fr. 2.10

SENTEMA KORO

La mizerulo: Mia edzino estas malsana, miaj ses infanoj estas malsanaj, mi estas malsana, kaj ni havas nek unu peceton da pano, nek unu pecon da ligno, — ni suferas malsaton, malvarmon ... — Ho kompatu, sinjoro ...

La sinjoro (AL SIA SERVISTO): Johano, elpelu tiun ĉi homon, ĉar li disfendas mian koron.

MONOLOGO DE STUDENTO

— La liverado estas vere tre malbona nun en la poŝto. Mi skribis jam antaŭ dek tagoj al mia onklo por havi monon, kaj ĝis nun la poŝto ne alportis ĝin al mi.

LA MIRINDAĴO

Du hebreaj vojaĝantoj interparolas en la vagono.

— Ni havas rabenon, — diras la unua, kiu faris jam mirindaĵon.

— Kaj en kio konsistis tiu mirindaĵo? — demandas la alia.

— Li, promenante sur la strato, rimarkis knabon hebrean, kiu manĝis kolbason porkaĵan. Por puni la kulpuilon, la rabeno deziris, ke la knabo malaperu sub la teron. Post momento li pensis, ke la knabo povas esti senkulpa en sia peko, kaj ke estus maljusta lia puno; li do deziris, ke la knabo ne malaperu sub la teron. — Kaj efektive, la knabo ne malaperis sub la teron.

NUR POR OK TAGOJ

— Pruntedonu al mi dek frankojn por ok tagoj.

— Se vi bezonas tiun prunton nur por ok tagoj, tre volonte mi disponigas ĝin al vi.

Post dudek tagoj la prunedoninto renkontas la pruntepreninton kaj riproĉas lin:

— Nu, amiko, la ok tagoj jam forpasis. Vi ne plenumis vian promeson.


— Ho jes, amiko. Ĉar mi petis de vi la dek frankojn por ok tagoj, kaj mi vere diselspezis ilin dum la daŭro de ok tagoj.

HELPO

Junulo: Sinjoro, mi amas vian filinon, mi absolute *ne povas vivi* sen ŝi ...

La patro de l'amatino (INTERROMPANTE): Do, mi entreprenos pagi la elspezojn de via enterigo.

ĜUSTA RESPONDO



La instruisto: Se al tri litroj da vino oni aldonas ankoraŭ du litrojn, kio estos la rezulto?

La infano: Homo ebria.

LA DOKTORO

— Ĉu estas vere, ke vi vendis vian velocipedon?

— Jes, amiko, domaĝe, — ĉar la doktoro malpermesis al mi ĝian uzadon.

— Ha, ĉu doktoro de leĝoscienco?

FLATO

La arbaristo (AL LA ĈASANTA GRAFO, POST "TRAFINTA" PAFO):
Belega, belega pafisto ĝi estis, via grafo moŝto. La domaĝo estas nur, ke, antaŭ la pafado, tiu mizera leporo ne tie estis, kie la ĉashundo.

SENHELPA MORTO

Esploristo de mortintoj demandas la vidvinon:

— Kiu kuracis vian edzon dum lia malsano?

— Neniu, — respondas la vidvino, — li mortis sen hel-po de kuracisto.

EMINENTA KURACISTO

La kuracisto (VIZITANTE LA MALSANULEJON): Kiom da malsanuloj mortis hieraŭ?

La vartistino: Kvar.

La kuracisto: Kvar? Terure! Mi ordonis kuracilon por kvin malsanuloj, kaj ...

La vartistino (INTERROMPAS): Sed unu el ili ĝin ne akceptis.

PRECIZE MARKITAJ

Studento, kiu drinkis dum la tuta nokto, matene volas pagi. Li vokas la kelneron: —Ok litrojn da vino ...

— Pardonu, vi havis dek litrojn.

— Ne vere; mi faris je ĉiu litro strekon per kredo sur la tablo —rigardu, tie ĉi estas nur ok strekoj.

— Tre ĝuste, sinjoro, — respondas la kelnero, — sed mi estas tamen prava, ĉar du strekoj estas videblaj ankaŭ sur la *planko*.

EL LA FIZIKO

La profesoro: Kio kaŭzas, ke la tagoj estas en somero longaj kaj en vintro mallongaj?

La lernanto: Ĉar la varmo vastigas kaj la malvarmo malvastigas.

SENKAŬZA EKSEDZIĜO

Malpacaj geedzoj iras al la pastro.

La edzo: Via pastra moŝto, mi deziras eksedziĝi.

La pastro (AL LA EDZINO): Kaj vi, mia filino?

La edzino: Mi ankaŭ deziras eksedziĝi.

La pastro: Miaj gefiloj, kiam geedzoj estas tiel samvolemaj, la eksedziĝo estas absolute nenecesa.

VORTLUDO

A.: Bonan tagon, amiko. Vi estas tie ĉi? Vi transmigris el via urbo en la nian! ...

B.: Jes, sed mi logos tie ĉi nur dum la daŭro de la striko de l'panbakistoj en mia urbo.

A.: Ĉu la panbakistoj strikas ĉe vi?

B.: Jes, bedaŭrinde. La loĝantoj de mia urbo estas devigataj manĝi kukojn anstataŭ panon.

A.: Ĝi do fariĝis *kukurbo*.

SURPRIZA RESPONDO

La junulo: Se mi iam edziĝos, mi ne demandos pri la doto de mia fianĉino ...

La sinjorino: Vi pensas ja noble.

La junulo: Ĉar mi edziĝos je tia virino, pri kiu mi certe scios, kian doton ŝi havas.

KOMPLEZO

La bankdirektoro: Kara advokato, mi petas de vi kompletan bonfaron.

La advokato: Kion do?

La bankdirektoro: Oni procesumis mian bankon. Mi estus tre kontenta, se vi povus tiel aranĝi la aferon, ke *vi* estu la advokato de nia kontraŭulo.

LA LASTA VORTO

Ludovikino vizitas sian amikinson vidviniĝintan.

— Kaj kiuj estis la lastaj vortoj de via edzo?

— Li ne havis; vi ja scias, ke inter ni ĉiam *mi* diris la lastan vorton.

www.omnibus.se/inko

ISBN 91-7303-148-8